

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

103-a jaro • n-ro 1240 (10) • Oktobro 2010

La 6-a Azia Kongreso okazis en Ulanbatoro, ĉefurbo de Mongolio



**Retrorigarde
al la 95-a UK**

**Agado ĉe UN
kaj Unesko**

**La 83-a
de SAT**

**Somera
E-Studado**

Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio

☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72INGB0000378964
BIC: INGB NL2A)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org

TTT: www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

195 ... Malferme: Interagoj kun la ne-Esperanta mondo (Stefano Keller)

196 ... Retrorigarde al la 95-a UK: Inaŭgura parolado de la Prezidanto

198 ... UEA premiis, diplomis kaj subvenciis

199 ... Ulrich Brandenburg nova Honora Patrono

200 ... Internacia Infana Kongreseto apud la "plenkreskula"
(Adenjo Charrière)

201 ... Agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko (Humphrey Tonkin)

202 ... UN-bezonoj kaj Esperanto (Rob Moerbeek)

203 ... *Le Monde diplomatique en Esperanto*: Nemalhaveblaj analizoj pri nia
mondo (Jeanne-Marie Cash)

204 ... Satiro: Nomoj kaj homoj (István Ertl)

205 ... Recenzoj: Federicco Gobbo pri *La arto labori kune* (sekcioj IV-VI)

207 ... Jorge Camacho pri *Kiel Israelo elpelis la palestinanojn* (1947-1949)

208 ... Baldur Ragnarsson pri *Yvonne. Sonetoj malsekretaj*

209 ... Laste aperis

211 ... Oficiala informilo; Kotiztabelo por 2011

212 ... Somera Esperanto-Studado (Katarína Nosková); La 83-a de SAT
(Milčo Beloreški)

213 ... La 6-a Azia ĝuis Mongolion (Lee Jungkee); Denove aŭdeblaj dum la
Ekonomia Forumo (Petro Baláž)

214 ... Forpasoj. Anonceto

KOVRILPAGE: En junio 2010 Komisiono pri Azia Esperanto-Movado, KAEM,
organizis en la ĉefurbo de Mongolio, Ulanbatoro, sian imponan 6-an Azian
Kongreson (legu pli sur la p. 213).

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado): Prof. Probal Dasgupta, LRU,
Indian Statistical Institute, 203 B.T. Road,
IN-700108 Kolkata, Barato;
☎ +91 33 2359 7731;
✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont,
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,
Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado):
S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Między-
narodowa 38/40a m 217, PL-03-922
Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79 21
[h], ✉ +48 6000 51 425;
✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino
Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,

NL-2903 AC Capelle aan den IJssel,
Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20;
✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ino Maritza
Gutiérrez Gonzáles, Avellaneda 212, e/
Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana;
☎ (of) +53 7 6489201, (h) +53 7 6498729;
✉ itzagutierrez@hotmail.com, mgglez@enet.cu

Scienca kaj faka agado: Prof. Amri
Wandel, 767 Makabim, IL-71799 Modiin,
Israelo; ☎ +972 544 548712; ✉ amri@huji.ac.il.

Eksteraj rilatoj: S-ro Stefano Keller,
Case postale 6034, CH-1002 Lausanne,
Svislando; ☎ +41 76 261 06 09;
✉ kellerstefano@gmail.com.

Observanto de TEJO: S-ro Gregor
Hinker. **Observanto de ILEI:**
S-ro Stefan MacGill.

Interagoj kun la ne-Esperanta mondo

Ni kutimas diri 'eksteraj rilatoj' de UEA, aŭ ni parolas pri la 'publikaj rilatoj' de la Esperantaj aktivuloj, de nia movado – por nomi tutan aron da niaj aktivecoj: varbaj, informaj, instruaj-edukaj, lobiadaj, intervenaj. Tiuj okazas diversnivele, kompletigante unu la alian de niaj strategioj: la desuban kaj la desupran. Se iun ajn de tiuj agadoj ni ekzamenas, la konstato estas la sama: la tutmondan laboron de esperantistoj animas iuspeca idealismo, pasio por lingvoj, la principo de lingva egaleco, aŭ iu miksita formo de ĉio tio. Ni emas fari ion por kontribui per nia ago al la solvo de la monda bezono pri lingva justeco.

Ekzistas agantoj je loka nivelo, aliaj agas je la landa. Kreiĝis Esperantaj sekcioj de politikaj partioj, fondiĝis ankaŭ esperantistaj partioj agantaj je nivelo de la ne-Esperantaj. Pli supre troviĝas la nivelo de agado en rilato kun interŝtataj kaj internaciaj organizoj. Niaj plej altnivelaj rilatoj realiĝas en nia ĉeesto ĉe UN kaj Unesko. Kiu ajn estu la nivelo de interago, ni enplektu niajn aktivajn rolojn en la elstaraj, signifaj oficialaj eventoj, festadoj lokaj, regionaj kaj internaciaj. Ni ligu kontaktojn inter UEA kaj neregistaraj organizoj similcelaj, ni pluflegu la jam ekzistantajn.

Per nia agado ĉe interregistaraj, internaciaj organizoj ni alportu niajn observojn pri problemoj koncerne la realegblon de lingvaj rajtoj, ni klopodu iel influi, kaj iom post iom akceptigi la respektadon de la rajtoj de ĉiu minoritato aŭ indiĝena popolo je uzo de sia propra lingvo, ĝuo pri sia propra kulturo.

Ni atingu ke la Jardeko de Lingvoj eniru la kalendaron de Unesko, same kiel la festado de la 26-a de julio, la Tago de Esperanto kaj de la interkultura komunikado!

Laborante pri lingvopolitikaj defioj, dum pripensado de kontaktebloj kun neesperantistoj, ni nepre devas havi bone adaptitajn strategiojn por la realigo de kunlaboraj rilatoj kun lingvistoj, juristoj, defendantoj de homaj, lingvaj rajtoj, kun universitataj profesoroj kaj verkistoj.

Se ni ne flegas rilatojn kun mondfamaj lingvistoj kaj juristoj, tiam ni perdas valorajn apogantojn de nia afero, maltrafas eblojn, okazojn, kiuj permesus al ni efike plui progresen. Samtempe, ni povas prezenti nin kaj al la scienca publiko monda, kaj al la defendata populgrupo per nia kunlaboro, per niaj intervenoj – en partnereco kun la spertuloj fakaj kaj mondvasse konataj.

Efika informado estas necesa je ĉiuj niveloj sociaj, profesiaj, politikaj. Por tio ni bezonas bonajn materialojn, pretigitajn de kompetentuloj pri informado. Pluraj lingvistoj, politikistoj kaj aliaj koncernatoj rifuzas Esperanton kiel alternativon al la hodiaŭa internacia komunikado, sen vere scii ion pri ĝi. Se ni sukcesas

interesi tiujn decidantojn aŭ influpovajn personojn pri konsidero de faktoj koncerne la internacian lingvon, ni jam ekhavas almenaŭ ŝancon konvinki ilin. Sed, por tio ni devas disponigi por ili facile kaj rapide alireblajn informojn. Ĉar ignoro de faktoj (ĉu vola, ĉu nevola) kaj antaŭjuĝoj malhelpas adopton de utilaj solvoj.

Necesus ĝenerale pli da interago kun la ekstera mondo, ni utiligu ĉiujn eblajn pasejojn, pontojn, pordojn, enirejojn inter Esperantujo kaj la ne-Esperanta mondo. Sed por realigi tion, estus bone pli kaj pli larĝigi la rondeton de intense aktivaj esperantistoj. Ni devas konsciiĝi ankaŭ pri tio, ke en tiu lukto ni devas resti nelacigeblaj, ĉar ni staras antaŭ nefacile supereblaj obstakloj. La lingvan politikon de ŝtatoj influas tutmondiĝaj tendencoj eĉ en la kampo de edukado, kaj la originoj de tio estas en la tendencoj de la komerco, scienco kaj kulturo.

Nuntempe oni povas paroli pri la ekzisto de etna, nacia kaj supernacia identeco. Nin ĉirkaŭas granda kultura bunteco de diversoriginaj kunloĝantoj, ni estas sub aro da influoj el ĉie en la mondo. Tiu diverseco estas baza kondiĉo de daŭra kaj vivopova pluekzisto de la homaro kaj same estas por la naturo. Ni devus povi gardi tiun buntecon vivigan kun samtempa sento de aparteno al la tuto, al la tuta homaro.

Ni devus atingi tion, ke UEA iĝu la pli kaj pli laŭta kaj respektata voĉo de etnaj, lingvaj minoritatoj. Ni defendu la lingvajn rajtojn per la disvastigo de Esperanto kaj per efika agado kadre de internaciaj organizoj kiel UN kaj Unesko. Ni esploru, analizu la aktualajn situacion kaj eblojn de interagoj kun la ekstera mondo, trovu, difinu novajn okazojn, agadmanierojn kaj strategiojn, efikajn cele al planado kaj efektivigo de konkretaj paŝoj. Ni agadu profesie kaj prilaboru la plej ĝustan vojon al kreskigo de la prestiĝo de UEA kaj de Esperanto ĝenerale antaŭ aliaj NRO-j, same kiel antaŭ la ĝenerala publiko. Aktivuloj akiru influajn rolojn, postenojn en similorientitaj NRO-j, ĉefe ene de la organizo CoNGO (la konferenco de NRO-j en konsulta rilato kun UN).

Nun, kiam mi ekpaŝas sur la vojo pretigita per la laboro de Lee Chong-Yeong kaj Ranieri Clerici (por mencii nur la du lastajn gvidantojn de nia aktivado surkampe de interagoj kun ne-Esperantaj, altnivelaj partneroj), mi diras ĉion tion kadre de nia revuo, ĉar mi ne havis la eblon persone interparoli kun vi en la 95-a UK, tamen volis iel danki vin ĉiujn, kiuj esprimis sian konfidon por mi dum la ĵusaj elektoj. Samtempe mi ŝatus dividi kun ĉiu kara leganto mian cerbumadon pri la taskoj, kiuj atendas nin surterene de niaj publikaj rilatoj, esperante, ke nia kunlaboro estos vigla kaj fruktodona.

Stefano Keller,

Estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj



Retrorigarde al la 95-a UK

Inaŭgura parolado de la Prezidanto

Estimata s-ro Alta Protektanto, estimataj eminentuloj sur la podio kaj en la salono, estimataj kongresanoj,

Bonvenon denove al la ĉiujare mirakla Universala Kongreso. Novaj kongresanoj, precipe homoj neniam antaŭe aliĝintaj al internacia Esperanta aranĝo, trovas en sia unua UK personan sperton pli superŝutan ol ili imagis. La eterna homa deziro atingi transbaran, transmaran kaj tamen personan amikecon aparte pure esprimiĝas en niaj kongresoj.

Ĉi-jare la kongreso suplementas sian kutiman bonvenigon per io tute speciala – Unuiĝintaj Nacioj deklaris ĝuste la 18-an de julio kiel la Internacian Tagon de Nelson Mandela. Ke ni inaŭguras kongreson ĝuste en unu el la landoj de la monda "suda" en la 92-a naskiĝa datreveno de tiu granda sudafrikano, kiu kontribuis al la interproksimigo de la kulturoj kaj kontribuis al la paco en la multlingva, multetna Sudafriko, estas datkonverĝo tute aparte priĝojinda. Ni ĉiuj scias, ke lia ĉielarka Sudafriko inde gastigis la mondpokalan futbaladon, kie la fina ĉampioniĝo de hispanlingvanoj eble varmigi iujn korojn en ĉi tiu mondparto!

Sed pri tiu temo ni parolos tuj post mia parolado. UEA sendos mesaĝon al Nelson Mandela, kiel ni klarigos. Ĉi-momente ni revenu al la bonvenigado al niaj unuafojaj kongresanoj. Tiuj niaj unuafojuloj evidente neniam forgesos sian sperton. Sed al kiuj ili plej ŝuldas tiun ĉi sperton neforgeseblan? Ĉefe al tiuj inter vi, kiuj estas veteranoj, kiuj dudek aŭ kvardek aŭ kvindekfoje kongresis, kaj kies senmanke varma *veterana* ĉeesto fasonas agrablan *veteron* de la unika esperantista medio de amikeco trans la kontinentoj, la insuloj, la polusoj kaj la tropikoj, inter kiuj ni cirkulas kongrese. Al vi veteranoj ni esprimas nian koran dankon; ni dankas vin en Esperanto – en lingvo de kontrastoj kaj de simileco.

La similoj kaj la malsimiloj ambaŭ grave rolas en la amikeco. Kial donas al mi plezuron veni al tiu ĉi lando el mia same tropika lando? Pro la simileco inter Kubo kaj Barato. Tamen, ĉu ni kontinentanoj ofte vizitas insulojn? Ne, kaj tiu faktoro instigas min dum tiu ĉi vizito pensi al aliaj insuloj. Tiun mian kontinentanan kontentiĝon mi ŝuldas ĝuste al la kontrasto.



Kial mi subite elokventas pri kontrastoj kaj malkontrastoj? Nu, vi scias, ke la ĉi-jara kongreso temas pri la interproksimiĝo de kulturoj en multlingva mondo, ĉu ne? Ni bezonas tiel la similojn kiel la malsimilojn. Se ni ne estus dekomence almenaŭ iugrade similaj, tiam ni neniel eĉ komencus reciproke proksimiĝi. Aliflanke, se ni tro similas, aŭ sukcesos tro similiĝi, tiam ni per tia interproksimiĝado nur tedados unu la alian. Hodiaŭ ni scias, ke sur planedo feliĉe multlingva ĝuste nia investo pri la diverseco garantias, ke ni nepre ne fariĝu tro similaj, ĉu ne?

Tiu ĉi ideo estas iom nova por ni ĉiuj. Antaŭe la idealistoj kutime pledis por idealoj unuecigaj. En unu lando ili pledis por nacia unuecigo. Sur la monda skalo ili strebis al harmonio, kiun ili komprenis kiel sendivide, sendiference unuecigitan homaron. Sed ni hodiaŭ lernas deziri unu konektitan planedon, kiu estimas kaj flegas ĝuste la diversecon. Tiu ĉi lernado okazas ne nur en Esperantujo: la media katastrofo devigas nin serĉi vojojn por savteni la vivdiversecon kaj disvolvi aliajn parencajn diverseco-ideojn. Sed ni esperantistoj jam de longe pioniris, kaj veterane kultivas, similan kampon. Ni laboras por savteni la diversecon de konversacioj.

Ni aspiras al tutplaneda konversacio inter la lokaj kaj regionaj konversacioj, kiu savtenas ilian lokan kaj regionan viklecon kaj pere de ili la demokration.

En 1888 Zamenhof transdonis la taskon pludisvolvi sian lingvan prototipon al la publiko uzonta lian novnaskitan projekton. Ekde tiu mejloŝtona jaro la esperantista komunumo evoluigis tiun ĉi idealon novan por la homaro. Kaj kiom ni progresis en tiu disvolva laboro? Kion nia unike esperantista konversaciado ĉerpis el la fonto ofte nomata la globa sudo – el Kubo kaj aliaj landoj de Latinameriko, Afriko kaj Azio?

En la fruaj jaroj de la esperantista konversacio, ne havis reliefan lokon la sudaj voĉoj. La prahejmoj de la Esperanta lingvo-kultivado – Rusujo, Svedujo, Francujo – dialogis kun aliaj orient- kaj okcidenteŭropaj socioj, kiuj ĉeftrafikis ĉirkaŭ tiu akso. Ankaŭ kiam la Esperanta literaturo serioze floris, ni vidis prosperi sinsekvajn hungaran kaj skotan skolojn post



la respektivaj mondmilitoj. Iliaj revuoj gastame akceptis kontribuojn ankaŭ el la sudaj landoj. Tamen ili eble ne plene komprenis, ke la konsisto de la monda konversaciantaro ŝanĝiĝas, kaj ke tial ankaŭ nia unika kultura konversacio inter kulturaj konversacioj devas remuldi sin laŭ tiu nova konsisto.

Unu homo multe fortostreĉinta por alporti tiun komprenon estis Tibor Sekelj. Li vojaĝis ĉien, parolis kun ĉiuj, kaj senlace verkis pri siaj spertoj kaj konversacioj. Ekzemple, en la ikona porinfana verko *Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo*, Sekelj montras sin lernanta de la sudamerika indiĝenpopola knabo Kumeŭaŭa, kies intelekta mentoro estis pliaĝulo el lia popolo, "maljuna Maloa". Sekelj certe ekzemplis la iom troan ekzotikismon de siaj tempo kaj loko. Sed ene de komprenindaj limoj li heroe strebis rompi murojn, vastigi konversaciojn kaj devigi la nordon kaj la sudon lerni unu de la alia.

Iuj gvidaj figuroj en la eŭropa esperantista junularo en la sesdekaj jaroj lanĉis novan tipon de konversacio kun la sudaj landoj. Tiu generacio identigis ĉi-rilate du celojn. Unuflanke ili laboris por plikonsciigi la civitanojn en la nordaj landoj kaj intensigi la konkretan evoluhelpadon al la sudo. Aliflanke ili strebis por ke la sudajn voĉojn en Esperantujo la nordaj agantoj akceptu kiel dignajn kamaradojn, kaj ja ne kvazaŭ humilajn ricevantojn de helpo. De ilia deklaro de Tyresö ĝis la posta-generacia manifesto de Prago, ni spertis evoluon for de naiva mond-unueciga idealo al la akcepto de regiona plurismo kaj de ekologia niĉaro kaj ciklaro. Tio estas logika sekvo kaj daŭrigo de la agado de la generacio de Tyresö.

La efikon de la laboroj de la generacioj de Tyresö kaj Prago sur la esperantistan konversacion inter konversacioj ni ankoraŭ ne sukcesis vere digesti. La psikologion en Esperantujo regas ankoraŭ la budapeŝta kaj skota skoloj, kiuj malgraŭ persona bonvolemo ne ĝiskapablis akcepti la sudajn voĉojn kiel egalajn partnerojn. Kaj dume, trafis nin la leviĝo de alia maniero konversacii – la Interreto!

Ni eble komencis pensi, ke ni komencas lerte manipuli la stirilon de monda movado por serioza reedukiĝo al planedana konscio. Sed ĝuste en tiu momento la Interreto, kaj ties multkanala interŝanĝado de bildoj, sonoj, kunkroĉe kun dokumentoj, draste malfaris la iaman seriozecon de la edukaj kaj kulturaj sistemoj. En la nuna generacio, la esperantistoj serĉas kulturajn ikonojn ne tiom en libraj tekstoj, kiom sur la kompaktaĵoj, kie kreiĝas muzika noveco. Bertilo Wennergren estas eble la sola hibrida figuro, same rokmuzika kiel vortarista. Ĝenerale la hodiaŭaj atingantoj devas elekti, ĉu steli sur la distra-amuzindustria ekrano aŭ ĉu fosi la tradician tekstan sulkaron.

Nia tradicia esperantista konversacio inter konversacioj alfrontis en sia historio malamikojn potencajn. Sed ni de longe povoscias interveni por antaŭenigi la edukan kaj institucion maldiskriminacion, la sisteman estimon al ĉies homaj rajtoj kaj aliajn ĉiesigajn celojn. La aktuala demando estas, kiamaniere nia stilo kresku por atingi ion similan en la malsistema epoko de tiu ĉi eduk-amuza – ni nomu ĝin la *edmuza* – industrio.

Estas nova fenomeno la edmuza industrio, kiun ni ja ne pentru kvazaŭ meduzon. Ne nur ni esperantistoj, sed ankaŭ

aliaj kulturaj movadoj komencis fosi novajn sulkojn tiutere. Ne estas nova la ludo de eduka amuzado; nia Claude Piron scipovis verki kaj serioze kaj krimromane, kaj mi ĵus menciis Bertilon Wennergren. Resume dirite: niaj pintaj unuopuloj adaptiĝas kaj jam lerte elpaŝas en generacio post generacio. La esperantista socio devas zorge aŭskulti, spekti, kaj eĉ legi tiujn sukcesulojn kaj ligi ilian kreskadon al nia movada strebado al maldiskriminacia kultura etoso ebliganta la ĉiesan observadon de homaj rajtoj kaj plenumadon de homaj bezonoj sur krizanta planedo.

Mi persone pensas, ke urĝe necesas metodo por traduki tiujn unuopulajn atingojn en pli ĝeneralan rekomprenon de niaj laboroj. Tiu rekompreno devos havi radikojn en la pasinteco kaj vivipovajn foliajn flugilojn, kiuj birdos en novan ĉielon.

Tiucele mi proponas al vi, sinjorinoj kaj sinjoroj, uzindan strategion, kiu aperas en la malneta strategia laborplano ekzamenota en la komitataj kunsidoj dum tiu ĉi kongreso. Mi aludas al la Projekto Vizaĝoj. Kion celas tiu projekto?

Mia tezo estas, ke vizaĝojn de grandaj atingintoj oni facile rekonas, kaj pere de ili oni komencas pli klare ekoni la idealojn, kiujn ili evoluigis en siaj ekzemplaj vivoj. La esperantista dialogo kompreneble celas elstarigi ĝuste la plej dialogajn vizaĝojn. Mi jam menciis Sekelj. Anstataŭ skeme paroli pri tiu aŭ alia skolo mi nomu Auld, Kalocsay, Baghy, Urbanová, Montagut, Declerck, en la tradicia, libra kulturo. La oficiala versio de la Projekto Vizaĝoj provizore proponas la produktadon de vikipediaj tekstoj kaj de iuj paperaj dokumentoj kaj libroj sur tiu bazo. Sed ni planas reintertrakti la detalojn de nia malnetaĵo dum unu jaro. Ĉu vi ŝatas la ideon, ke niaj rokmuzikaj, filmaj, teatraj steluloj inĝenie kreu plurmodajn artaĵojn por pli efike konatigi niajn vizaĝojn?

Kompreneble ĉiu lando devas elstarigi ankaŭ proprajn vizaĝojn. Kaj mi de longe pledas por tio, ke la esperantistoj zorge elektu aliancinojn kaj prezentu ankaŭ iujn neparolantojn de Esperanto kiel pintajn amikojn de, kaj kontribuintojn al, nia universalisma afero. Mi persone sekvos kun granda intereso la decidojn de kubaj esperantistoj pri la vizaĝoj elstarigotaj. La nordo povas lerni de tiu ĉi ikona sudeca lando i.a. novajn metodojn de mastrumado de organika agrikultura sistemo. Eble iuj esperantistaj verduloj persvados niajn kubajn samideanojn elstarigi la vizaĝojn de iuj organikaj agrikulturistoj, kiuj ne mem lernis Esperanton, sed kies aliancanecon ni povas rikolti? Tio estas nur ekzemplo, pri kiu mi aŭdis. Bonvolu pliklerigi min – kaj nian komitaton – dum la kongreso, kiu nun komenciĝas, ĝeamikoj. Ni venas al kongresoj por *lerni* de vi ĉiuj en kaj ekster la salono. Dankon pro via atento.

Probal Dasgupta

ĜUSTIGO: En la septembra n-ro, p. 183, "Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA 2010", estis mise anoncita la tria premio en la branĉo POEZIO: tiun la juĝantoj atribuis al Josip Pleadin pro *Ekzistas ie kaŝita loko*.

ESTAS TEMPO REKOTIZI POR 2011!

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de tiu ĉi revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo de UEA. Antaŭdankon!

UEA premiis, diplomis kaj subvenciis

En la Solena Fermo de la 95-a UK oni laŭtradicie anoncis laŭreatojn de premioj, diplomoj kaj subvencioj, laŭ la decido de la Estraro de UEA.

Tri premioj de Fondaĵo Grabowski en 2010

Fondaĵo Antoni Grabowski de UEA subtenas elstarajn atingojn de la Esperanta kulturo. La ĵurianoj de la Fondaĵo (Ulrich Lins, István Ertl kaj Mine Yositaka) aljuĝis ĉi-jare tri monpremiojn. La decido estis publikigita en la ferma ceremonio de la 95-a UK en Havano.



Premion de 900 USD ricevis Klivo Lendon, kanadano vivanta en Tokio, kiu esperantigis la epokfaran verkon *La origino de specioj* de Charles Darwin. La traduko aperis en 2009, en la jaro de la 200-a datreveno de la naskiĝo de Darwin kaj 150 jarojn post la apero de la verko. Eldonis ĝin Flandra Esperanto-Ligo. Laŭ

la ĵurio la Esperanta versio estas surprize moderna kaj flue legebla. Piednotoj ebligas klaran komprenon de la tiamaj sciencaj konoj kaj bone klarigas la kuntekston. Recenzanto en *Monato* skribis, ke oni legas la tradukon, kvazaŭ Darwin mem verkus en Esperanto.



Alia premio, ankaŭ 900 USD, estis donita al Geoffrey Sutton, angla filologo kaj iama redaktoro de la revuo *Esperanto*, kiu kompilis anglalingvan enciklopedion pri la originala literaturo en Esperanto, *Concise Encyclopedia of the Original Literature of Esperanto*. La 740-paĝa volumo aperis en 2008 ĉe la eldonejo Mondial en Novjorko. Kun pli ol 300 artikoloj pri la plej gravaj verkistoj kaj iliaj verkoj, ĝi estas la plej detala manlibro pri la Esperanta literaturo entute aperinta en nacia lingvo. Tirante la atenton de anglalingvaj legantoj al ĝis nun tute neglektata temo, ĝi sukcese respondas la bezonon pli vaste konatigi la Esperantan kulturon ekster Esperantujo.

Mondial en Novjorko. Kun pli ol 300 artikoloj pri la plej gravaj verkistoj kaj iliaj verkoj, ĝi estas la plej detala manlibro pri la Esperanta literaturo entute aperinta en nacia lingvo. Tirante la atenton de anglalingvaj legantoj al ĝis nun tute neglektata temo, ĝi sukcese respondas la bezonon pli vaste konatigi la Esperantan kulturon ekster Esperantujo.



Speciala premio de 500 USD estas dediĉita al la memoro de Madeleine de Zilah, kiu kunfondis la revuon *La Gazeto* en 1985 kaj kunredaktis ĝin ĝis sia subita forpaso en 2009. Kun ŝia nomo estas ligita la evoluo de *La Gazeto* al unike varia, altnivela kultura revuo. Ŝi, ĉiam kun sia edzo Eŭgeno de Zilah, ekde 1988

organizis internaciajn konferencojn, en kiuj ekde 1990 ĉiujare aŭtoro estis premiita pro elstara libro nefikcia en Esperanto. *La Gazeto* plu aperas, nun sub la redakto de Eŭgeno de Zilah (kun Ed Borsboom, K. Jakobo kaj Paola de Zilah).

Subvencio Cigno por du projektoj

Subvencio Cigno de UEA, financata de la japana industriisto Miyoshi Etsuo, estas donata ĉiujare por subteni seriozan Esperanto-agadon en la Tria Mondo aŭ la iamaj socialismaj landoj de Eŭropo. Ĝia valoro estas 500 000 japanaj enoj, t.e. preskaŭ 4400 eŭroj. Pri la subvencia sumo decidas la Estraro de UEA, kiu anoncas sian decidon en la ferma solenaĵo de la Universala Kongreso de Esperanto.

Ĉi-jare la subvencio estis egale dividita inter du ricevantoj. Esperanto-Asocio de Bosnio kaj Hercegovino ricevas subvencion por la renovigo de sia sidejo-kunvenejo kaj la Komisiono por Meza Oriento kaj Norda Afriko por informado pri Esperanto en arablingvaj landoj, unuavice en Libano kaj Egiptio.

Premio Deguĉi al Philippe Chavignon



La franca esperantisto kaj mondcivitano Philippe Chavignon ricevis en la fermo de la Havana UK la prestiĝan Premion Onisaburo Deguĉi. La Premio estis starigita en la Jubilea Jaro 1987 per donaco de Oomoto por ĉiujare distingi agadon, kiu per Esperanto antaŭenigas la internacian amikecon kaj solidarecon

en la spirito de L.L. Zamenhof kaj Onisaburo Deguĉi. Pri la laŭreato de la Premio, kiu konsistas el diplomo kaj monsumo de 2000 eŭroj, decidas la Estraro de UEA.

Philippe Chavignon naskiĝis en 1958 kaj esperantistiĝis en 1984. Li ricevis la premion pro sia longtempa agado en multaj landoj de Afriko kaj Latina Ameriko. En tiuj kontinentoj li plenumis diversajn informajn, instruajn kaj organizajn misiojn por UEA. En la 1990-aj jaroj li ekaktivis en indiĝenaj medioj, kunlaborante por la projekto Indiĝenaj Dialogoj kaj poste por la UEA-projekto Indiĝenaj Popoloj. Li ankaŭ funkciigis projektojn pri ekoturismo – antaŭ la ĉi-jara UK li organizis i.a. ekskurson tra Gvatemalo – pri sunenergio, memnutrado kaj abelbredado. Li estis dum multaj jaroj komitatano de Unuiĝo Franca por Esperanto. Ekde 2007 li estas komitatano C de UEA, kies dumviva membro li estas.

Sep elstaraj Esperanto-agantoj


Sep elstaraj Esperanto-agantoj estis diplomitaj en la ferma ceremonio de la 95-a Universala Kongreso en Havano. Unuafoje la Estraro de UEA aljuĝis la novan Diplomon pri Elstara Arta Agado, kiun la Komitato starigis

kiel samrangan ekvivalenton de la Diplomo pri Elstara Agado, asignatan ekde 2007 por rekonigi eksterordinare meritplenan agadon por Esperanto. Kiel la nomo diras, la nova diplomo premias eminentan kontribuon al la Esperantaj kulturo kaj arto.

Diplomon pri Elstara Agado ricevis d-ro Rüdiger Sachs el Germanio, kiu ekde 1997 gvidas Internacian Sciencan

Asocion Esperantistan, redaktante ankaŭ ĝian gazeton *Scienca Revuo*.

Diplomon pri Elstara Arta Agado ricevis aktorino Georgina Almanza (Kubo), aktorino Vida Jerman (Kroatio), ĥorestrino Franjo Lévêque (Francio), aktoro Saša Pilipović (Serbio), verkisto Trevor Steele (Aŭstralio) kaj verkistino Spomenka Štivec (Kroatio).



Rüdiger Sachs, Georgina Almanza, Vida Jerman, Franjo Lévêque, Saša Pilipović, Trevor Steele kaj Spomenka Štivec.

Ulrich Brandenburg nova Honora Patrono

S-ro Ulrich Brandenburg, la germana ambasadoro en Moskvo, estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA. La unuaniman decidon faris la Komitato de UEA en sia kunsido en Havano la 17-an de julio.

Ulrich Brandenburg naskiĝis la 12-an de oktobro 1950. Li estas denaska esperantisto. En aŭgusto 2007 li fariĝis konstanta reprezentanto de Germanio ĉe NATO en Bruselo. Poste, pro sia sperto pri la slava mondo kaj pri Rusio, li estis nomumita kiel ambasadoro en Moskvo, kie li deĵoras ekde aprilo 2010.

Post studado de lingvoj en Münster kaj Parizo Brandenburg unue laboris kiel instruisto. En 1980 li komencis sian karieron en la diplomatia servo de Germanio. Li deĵoris unue en la ambasado en Bagdado 1982-1984 kaj daŭrigis en la tiama Sovetunio



ĉe la ĝenerala konsulejo en Leningrado (Sankt-Peterburgo) de 1984-1986 kaj ĉe la ambasado en Moskvo 1986-1988. Ĝis 1995 li deĵoris en la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, krom 1991-1992, kiam li studis en la Harvarda Universitato. De 1995 ĝis 1999 li gvidis sekcion ĉe la administracio de NATO en Bruselo. Reveninte al la Ministerio en 1999 li laboris i.a. kiel komisiito pri Rusio, Kaŭkazio kaj Centra Azio kaj kiel vicestro de la Politika Departamento, ĝis sia unua nomumo kiel ambasadoro.

Dum pluraj jaroj Brandenburg aktivis en Germana Esperanto-Junularo, kies prezidanto li estis en 1974-1976. Li redaktis ankaŭ la GEJ-rubrikon "pozitive" en *Germana Esperanto-Revuo*. En 1974 li havis la ĉefan respondecon pri la organizado de la TEJO-kongreso en sia hejmurbo Münster. Vicprezidanto de TEJO li estis 1973-1975.


VIZITU VIAN PROPRIAN DOMON ĈE NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 27-an de novembro 2010 (10h00 - 17h00)

- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Specialaj ofertoj
- ★ Bazaro de esperantaĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

Speciala gasto:
MAURO NERVI



Internacia Infana Kongreseto apud la "plenkreskula"



La IIK-anoj sur la fama Placo de la Revolucio en Havano.

Foto: Juan Carlos Triana Alfonso

La 41-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) okazis en Kubo, en la belega hotelo Acuario apud la maro, nur 5 km de la UK-ejo, samtempe kun la UK (17-24 jul 2010).

La partoprenantoj, 35 infanoj, 18 knaboj kaj 17 knabinoj, kaj 9 plenkreskuloj, unue kuniĝis en la Havana UK-ejo. De tie ni kune busis al la IIK-ejo, al la hotelo Acuario.

Dum la tuta semajno ni ĝuis naĝadon du-foje tage en la hotela naĝejo. Tie okazis ankaŭ pluraj pilkludoj. Ni ekskursis al la maro, kie ni amuziĝis en la grandaj ondoj.

Anekdoto rilate al la bonegaj hotelaj kondiĉoj: la unuan tagon kelkaj infanoj trinkis pli ol 10 kolaojn! Malfacilis kontroli tion per la gvidantoj, ĉefe pro la kondiĉoj de la restado en la hotelo.

Dum ekskurso al Havano ni vidis la placon de la Revolucio (sur la foto), faman lokon kie okazas multaj politikaj kunvenoj. Poste ni haltis iom ĉe la haveno.

En la Nacia Akvario ni spektis mirindan spektaklon de delfenoj, marleonoj kaj aliaj marbestoj.

Notindaj estas la dancemo kaj la ridemo de la kubanoj. Al ili ĝenerale tre plaĉis la vesperaj dancadoj, ĉu por spekti, ĉu por mem danci. Kelkaj kubaninoj eĉ instruis al mi kiel "paŝi sur la kuba muziko". Estas tre interese

kiel ili dancas: ĉiam en grupo, kaj iu donas la ritmon. Tio estas tute malsimila al la eŭropaj dancmanieroj, kiuj estas pli individuaj.

Vespere ni plurfoje spektis kuban danc-spektaklon, kies stilo estis iom nekutima por eŭropanoj.

La densa programo ĉiam proponis iun aktivajon al la infanoj: desegnado por paco, prezento de sia lando kun projekciado de bildoj sur mura ekrano, origamio (japana paperfaldado) kaj sorobano (abako-kalkulado), farunstatuoj, lingvaj ludoj, ekskursoj al plaĝo, al Havano, sportado kaj kur-ludoj en grupoj, internacia vespero kaj spektaklo de la meksika grupo. Dum posttagmezaj paŭzoj ni povis dormi aŭ pli trankvile aktivumi. Preskaŭ ĉiutage okazis 3-nivelaj Esperanto-kursoj.

En la solena UK-fermo, en kiu aperis ĉiuj IIK-anoj, ni havis la plezuron kanti la famajn "Guantanamera": kaj "La krokodilo". Enirante la saloonon ni bruis sufiĉe multe, kaj ĝoje supreniris la podion.

Estis por mi granda plezuro unuafoje kunorganizi IIK-on, kun tre agrablaj kaj afablaj infanoj. Mi esperas ke tiu kunlaboro pli kaj pli grandiĝos laŭ la jaroj.

Mi menciuj ke donacoj de bonkoraj UK-anoj ebligis partoprenon al 17 kubanoj, pro kio ili meritas apartan dankon!

Adenjo Charrière



Agado ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko

Kunvenoj dum la Universala Kongreso de Esperanto, Havano, julio 2010

Okazis dum la kongreso du kunvenoj pri UN kaj Unesko. La unua formis parton de la Kleriga Lundo la 19-an de julio; la dua okazis la postan tagon kaj pritraktis la agadon de UEA en tiuj medioj.

La seminario la 19-an de julio celis informi la kongresanojn pri la laboro de UN kaj ties familio de organizaĵoj. Humphrey Tonkin prezentis mallongan historion pri la evoluo de UN, klarigante pri la centraj organoj, precipe la Ĝenerala Asembleo, la Sekureca Konsilio kaj la sekretariato, sed kun ioma atento al la Ekonomia kaj Socia Konsilio kaj la Internacia Kortumo. Li eksplikis, ke, aldone al tiuj centraj organoj, ekzistas dekkvino da specialigitaj organizaĵoj (el kiuj unu estas Unesko), regule financataj de la membroŝtatoj kaj ligitaj al la Ekonomia kaj Socia Konsilio. Plia granda grupo de "programoj" kaj komisionoj estas diversmaniere financata kaj diversmaniere ligita al la strukturo de la organizaĵo. En tiu ĉi lasta grupo estas pluraj bone konataj agadoj, ekzemple tiuj por infanoj (Unicef), tiu por rifuĝintoj, tiu por homaj rajtoj, kaj la Universitato de UN. Ili havas siajn sidejojn en diversaj urboj tra la mondo (la Universitato havas sidejon en Tokio, ekzemple, kaj la komisiono pri homaj rajtoj havas sidejon en Ĝenevo).

Ekzistas kvar grandaj oficejoj de UN – en Novjorko, Ĝenevo, Vieno kaj Najrobo.

Pere de la Sekureca Konsilio kaj la Ĝenerala Asembleo, UN subtenas plurajn agadojn tra la mondo por konservi pacon aŭ por pace solvi disputojn.

Tiel komplika organizaĵo ne ĉiam agas plene efike, kiel Tonkin klarigis. Ekzistas duobligoj inter diversaj instancoj aŭ nenecese grandaj burokratioj; aferoj forgesiĝas aŭ blokiĝas. Kulturaj diferencoj bremsas la efikecon de la oficistoj. En plej bonaj cirkonstancoj, la potenco de UN estas nur respeguliĝo de la potenco de la membroŝtatoj. Eĉ se ĝi malsukcesis malhelpi regionajn konfliktojn, tamen UN kiel tuto ŝajne helpis la homaron eviti mondskalajn konfliktojn, kaj sur amaso da kampoj (alfabetigo, helpo al rifuĝintoj, elimino de infektaj malsanoj, ekonomia evoluigo) ĝi povas montri al abundaj grandaj sukcesoj.

Post tiu rapida trarigardo de UN fare de Humphrey Tonkin, Neil Blonstein, kiu prizorgas la oficejon de UEA en Novjorko, klarigis pri la strukturoj je la dispo de neregistaraj organizaĵoj. La nombro de tiuj organizaĵoj multe pligrandiĝis en lastaj jaroj. El almenaŭ novjorka vidpunkto, ekzistas du ĉefaj kontaktopunktoj por NRO-j. Tiuj, kiuj ĝuas formalajn rilatojn kun UN kaj Unesko (inter ili UEA), havas aliron al la Ekonomia kaj Socia Konsilio, kie ili havas certajn limigitajn rajtojn interveni skribe pri demandoj ene de ilia interesosfero, kaj foje ankaŭ parole. Kunordigas la NRO-jn la Konferenco de NRO-j (CoNGO). En Novjorko, kiu ajn NRO povas peti enlistigon ĉe la Fako pri Publika Informado de UN (DPI), kiu tenas la NRO-jn informitaj pri la agado de

UN kaj instigas ilin disvastigi informojn. UEA estas membro de CoNGO kaj ankaŭ aktive kunlaboras kun DPI.

En la laborkunsido la postan tagon, oni pritraktis ses temojn:

Laboro ĉe UN. Oni ĉefe preparolis la agadon en Novjorko, kie lastatempa tuttaga planada kunveno de la teamo identigis tri ĉefajn prioritatojn: kreon de retpaĝaro pri UN kaj Unesko por utiligo de esperantistoj; revivigon de la iama alianco de neregistaraj organizaĵoj interesataj pri lingvaj demandoj, kaj okazigon de publika simpozio en decembro okaze de la Zamenhofa Tago (UEA organizis tian simpozion en 2009 kaj volas igi ĝin regula ĉiujara aranĝo). Humphrey Tonkin kaj Neil Blonstein kelkfoje emfazis la fakton, ke, se ni volas, ke UN atentu pri ni, ni devas esti pretaj atentigi la esperantistojn pri UN kaj ĝia agado: UN kunlaboras kun tiuj organizaĵoj, kiuj helpas ĝin. Sekve, sendepende de la propra valoro de UN kaj ĝia agado, indas klerigi la esperantistojn pri UN.

Laboro ĉe Unesko. François Lo Jacomo, ano de la Pariza teamo, klarigis, ke la ĉefa aktuala laboro tie (pri kiu oni bezonas helpon kaj kunlaboron de la aliaj teamoj) estas lanĉi Jardekon de Lingvoj, kiel postsekvon de la antaŭ kelkaj jaroj deklarita Jaro de Lingvoj. En la kadro de tia jardeko, UEA povus multon atingi, eventuale en kunlaboro kun aliaj NRO-j kiuj interesiĝas pri lingvaj demandoj. Evidente, revivigo de la supre menciita alianco povus multe helpi.

Eventualaj volontuloj. UEA konstante bezonas surlokajn helpantojn en Novjorko, Ĝenevo, Vieno kaj Parizo, por reprezenti la Asocion en kunsidoj kaj por sekvi la surlokan UN-laboron. Tamen, pro tio, ke pli kaj pli da aferoj estas fareblaj je distanco, UEA povas utiligi la helpon ne nur de volontuloj surloke, sed ankaŭ de tiuj kiuj loĝas en aliaj urboj. Ni nun fondis reton de kunlaborantoj kaj subtenantoj kun la titolo "Esperanto por UN." Ĉiu esperantisto povas aliĝi al ĝi per simpla livero de lia/ŝia retadreso al la Novjorka Oficejo de UEA. La anoj de Esperanto por UN ricevos de tempo al tempo informojn pri la agado kaj petojn pri helpo. Ni ankaŭ bezonas financon helpon: UEA ne buĝetis sumon por la agado ĉe UN kaj Unesko. Sekve, ni dependas de financaj kontribuoj de interesatoj. Vi povas finance helpi per donaco al la UN-Fonduso de UEA.

La rajtoj kaj devoj de NROj. En 1954 UEA akiris kunlaborajn rilatojn kun Unesko. El tio aŭtomate sekvis similaj rilatoj kun UN pere de la Ekonomia kaj Socia Konsilio. Ambaŭ organizaĵoj serĉas manierojn utiligi NRO-jn por antaŭenigi sian laboron. Reciproke, tiuj organizaĵoj havas la rajton interveni en la laboron de UN kaj Unesko kaj la devon subteni tiujn organizaĵojn laŭ la ebloj. Eta ekzemplo de ĉi-lasto, kiu atingis ambaŭ celojn, estis la fakto, ke la Prezidanto de UEA, Probal Dasgupta, aparte notis en sia festparolado dum la kongreso, ke UN nomis la 18-an de julio (t.e. tiun saman tagon) "Internacia Tago de Nelson



Mandela", rekone al la kontribuo de la iama Prezidento de Sud-Afriko al la kulturo de paco kaj libereco. Tiusenca rezolucio estis akceptita en novembro 2009 de la Ĝenerala Asembleo por memori pri la longdaŭra sindediĉo de la Nobel-Premiito al la paca solvo de konfliktoj, harmoniaj rilatoj inter la raso, homaj rajtoj, reharmoniiĝo kaj seksa egaleco. Prezidanto Dasgupta aparte dediĉis la unuan tagon de la kongreso al Nelson Mandela, kaj salutmesaĝo estos sendita pere de la sudafrika ambasado al s-ro Mandela okaze de lia 92-a naskiĝtago. La kuba gazetaro tuj raportis pri tiu decido – kaj UEA povos siavice raporti al UN tiun ekzemplon de kunlaboro.

Agado je landa nivelo. UN kaj Unesko konsistas el membroŝtatoj: ili estas koalicioj de ŝtatoj, kiuj diktas al ili ilian politikon. Pro tio, estas tre grava la interveno je landaj niveloj. Landaj Esperanto-asocioj kaj unuopuloj povas multon fari je landa nivelo. Oni aparte menciis kvin vojojn:

◆ **Asocioj pri UN.** Naciaj UN-asocioj kaj similcelaj organizaĵoj ekzistas en multaj landoj. Ofte, aliaj landaj organizaĵoj povas kunlabori kun ili aŭ aliĝi al ili. Ni rekomendas, ke ĉiu landa Esperanto-asocio ligu kontaktojn kun sialanda(j) asocio(j) kaj ke unuopaj esperantistoj aliĝu kiel individuoj, utiligante la kontakton por antaŭenigi Esperanton kaj informi la asociojn pri la laboro de la esperantistoj subtene al UN kaj Unesko.

◆ **Ministerioj.** La decidoj en la sidejoj en Parizo, Novjorko ktp. estas farataj surbaze de instrukcioj el la unuopaj registaroj. Sekve, landaj Esperanto-asocioj utiligu siajn kontaktojn kun ministerioj, parlamentanoj kaj diplomatoj por favore influi tiun politikon.

◆ **Unesko-komisionoj.** Multaj landoj havas Unesko-komisionojn, kiuj, surbaze de la politiko de la koncernaj landoj, kunordigas Unesko-rilatan laboron en la koncernaj teritorioj kaj helpas formuli tiun politikon. Ofte ekzistas vojoj al formala kunlaboro kun aliaj organizaĵoj, ekzemple Esperanto-organizaĵoj.

◆ **Centroj kaj regionaj sidejoj.** En pli ol 60 grandaj urboj tra la mondo ekzistas inform-centroj de UN, kiuj bonvenigas kontaktojn kun subtenaj organizaĵoj kaj kiuj en multaj kazoj proponas senpage utiligeblajn kunvenejojn al NRO-j. Indas utiligi tiujn servojn. En pluraj urboj troviĝas regionaj kunordigaj oficejoj de UN aŭ Unesko. Ekzemple, la regiona oficejo de Unesko por Latinameriko troviĝas en Havano. Rezulte de interveno de Kuba Esperanto-Asocio kaj de tiusenca mesaĝo sendita de la Unesko-sidejo en Parizo, stabano Tatiana Villegas ĉeestis la inaŭguron kaj fermon de la Universala Kongreso kiel reprezentanto de Unesko, kaj la surlokaj aktivuloj kaptis la okazon por preparoli kun ŝi la reciprokajn rilatojn.

◆ **Informado.** En landaj Esperanto-kongresoj kaj aliaj kunvenoj, en landaj kaj lokaj Esperanto-informiloj ktp, oni povas organizi informajn kunsidojn resp. verki informajn artikolojn pri UN kaj Unesko, tiel stimulante intereson kaj montrante la kunlaboran spiriton de UEA kaj ĝiaj landaj asocioj.

La lingvaj servoj. La baza interna lingvopolitiko de UN kaj Unesko estis formita en la jaroj tuj post la Dua Mondmilito kaj montras la potencrilatojn de tiu epoko. Esence la lingvoj de UN kaj Unesko estas tiuj de la venkintoj en tiu milito. Superflue diri, ke la mondo intertempe ŝanĝiĝis.... Precipe en Novjorko, la angla lingvo nun dominas la kunvenejojn kaj koridorojn de la UN-sidejo, kaj la lingvaj servoj, kvankam en si mem utilaj al

certaj membroj, fariĝas ĉiam malpli centraj. En la 1970-aj jaroj la tiama ambasadoro de Aŭstralio, la esperantisto Ralph Harry, ellaboris planon por la iompostioma transiro al Esperanto kiel ĉefa traduka kaj interpreta lingvo en UN, sed kun daŭra utiligo de la ĉefaj lingvoj de la mondo en debatoj. Kvankam tiu plano restas daŭre aktuala, la membroj de UN kaj Unesko ne adekvate rekonas la lingvan diskriminacion kiu fonas ĉiujn intertraktojn en naciaj lingvoj. Sekve, la lingva transformiĝo de UN kaj Unesko estas neprobable en la proksima estonteco. Intertempe, necesas levi la konscion de la membroŝtatoj pri la maljusteco de tia lingva diskriminacio kaj konsciigi ilin pri la rolo, kiun povus ludi la internacia lingvo Esperanto.

Humphrey Tonkin

UN-bezonoj kaj Esperanto

Ban Ki-Moon, la Ĝenerala Sekretario de UN, invitis Ne-Registarajn Organizaĵojn kunpensi por savi la "Global Commons" (Komunajn Valorarojn de la homaro kaj naturo). Ja ĉiujare ni forkonsumas 1,3-oblon de la terproduktoj, koste al estontaj generacioj. Responde, nederlandaj esperantistoj-mondfederistoj argumentis ke konvenas la uzo de la neŭtrala internacia lingvo Esperanto por igi la homojn tutmonde kunpensi kaj agi kun UN. Nur kiuj povas kundiskuti, kundecidi, sentas sin koncernataj por efektivi la komunajn decidojn. Uzo de nacia lingvo perdis tro da talento. Ni do ambicias mobilizi nian motivitan Gideonan bandon.

Ni i.a. proponis ke UN proprietu la liberajn marojn kaj oceanojn, el kies produktoj UN havu la necesajn enspezojn por grandskala purigado kaj kontrolado. Ankaŭ la fandakvo el Gronlando k.a. baldaŭ havos plian valoron ol nafto: kiel kolekti? Kaj vegetara, prefere plejofte vegana dieto savus enorman kvanton da energio.

UEA lanĉu ĝeneralan diskutadon per Landaj kaj Fakaj Asocioj por kunordigi la diskutadon kaj kribri la rezultajn proponojn. Certe ni engaĝu la junularon per lerneaj konkursoj.

Jen la ĉefaj defioj por la estonteco kaj (partaj) atingoj el "UN ideas that changed the world" (UN-ideoj kiuj ŝanĝis la mondon).

Plej ĝojige, en la UK de Havano Humphrey Tonkin iniciatis novan laborgrupon Esperanto por UN. Ankaŭ en tiu medio la teksto estis bonvena. Sed sekvu agoj.

UN-ideoj ŝanĝintaj la mondon:

La 10 ĉeftemoj por UN en la sekva jardeko

① Rimedi kontraŭ tervarmiĝo kaj klimatsanĝo. ② Fortigi mondregadon en multpolusa mondo. ③ Subteni rompigemajn ŝtatojn. ④ Ekvilibrigi regionismon kaj tutmondiĝon. ⑤ Moderigi malegalecon en tuttera evoluado. ⑥ Reagi al populacia kresko kaj internacia migrado. ⑦ Transponti internaciajn kulturajn kaj identecajn dividojn. ⑧ Ĉefan atenton por sekureco transigi de ŝtatoj al individuoj. ⑨ Integri kulturajn kaj homajn rajtojn en evoluigadon. ⑩ Tutmonde plibonigi la kvaliton de edukado/instruado.

Rob Moerbeek

Le Monde diplomatique en Esperanto: Nemalhaveblaj analizoj pri nia mondo

Ĉu vi jam demandis vin: Kion legi en Esperanto? Ekster la fikcia literaturo, pri kiu ni scias ke ĝi abundas en nia lingvo, ĉu ni povas legi ion interesan pri la mondo?

Niaj periodaĵoj temas preskaŭ ĉiuj pri la lingvo aŭ la movado, kun la rimarkinda escepto de *Monato*. El la abundaj retejoj, nur

Eventeo: www.eventeo.net ne estas primovada kaj funkcias kiel internacia novaĵagentejo en Esperanto, kie troveblas ĝisdataj sed mallongaj novaĵoj.

Sed kio pri la reta *Le Monde diplomatique en Esperanto*? Ĝi estas Esperanto-versio de franca monata revuo, soci-ekonomi-politika, liveranta originalajn analizojn pri la fenomenoj de la hodiaŭa mondo. Ĉu franca ĝi estas? Jes, sed granda parto de la artikoloj estas subskribitaj – eĉ ofte originale verkitaĵ hispane, angle, germane..., de alilandaj aŭtoroj. Do la vidanguloj estas diversaj.

Bunta frontpaĝo

Ni ĵetu rigardon al la unua paĝo de la monato aŭgusto 2010, <http://eo.mondediplo.com>:

El la kvar artikoloj, tri temas pri respektive Okcidenta Afriko, Aŭstralio kaj Srilanko en Azio. La kvara temas pri moderna arto, kaj ĝia rilato al politiko.

Se ekonomiko kaj politiko plej oftas, tamen ekologio kaj hommigradoj ne estas forgesataj temoj.

Artikoloj tradukataj en 28 lingvojn

La enhavo de la gazeto estas parte tradukita en 28 lingvojn, inkluzive de Esperanto. Tio signifas, ke en multaj landoj estas redakcio, kiu elektas kaj tradukas artikolojn, sed ankaŭ povas proponi aliajn. Tiel nia Esperanta eldono povas enhavi ankaŭ tradukojn de la alilingvaj redakcioj, kaj eĉ proprajn artikolojn.

Ekde la kontrakto farita en 2002 de Vilhelmo Lutermano kaj la estraro de LMD, la Esperanto-eldono rete publikigis pli ol 900 artikolojn. Kaj publikigis ĉiu-jare unu paperan eldonon, kies ĉefa celo estas konigi la ret-eldonon, dum Universalaj kongresoj (UK) aŭ Mondaj Sociaj Forumoj.

En 2009 ni publikigis 122 artikolojn, same kiel en 2008, helpe de 5 tradukintoj. Tio estas volontula senpaga laboro, kaj la artikoloj estas senpage alireblaj sur la retejo de LMD.

Kiu legas *Le Monde diplomatique en Esperanto*?

La ĉiutagaj vizitoj (de la Esperanta eldono!) stabiligis je pli aŭ malpli 800 (24 000 monate).

Vizitoj venas interalie el aliaj retpaĝoj kiuj havas ligon al la nia, en la lasta tempo venis regule vizitoj el 25 tiaj retpaĝoj. Multaj venas el alilingvaj eldonoj de LMD.

Instruistoj de Esperanto uzas tiun materialon por supera aŭ meza nivelo. La fakto ke ĉiuj artikoloj estas minimume en du aŭ pliaj lingvoj, donas kroman didaktikan valoron al niaj tekstoj.

Pretigi la lingvon estas nia afero

Ĉu vi dubas, ke Esperanto estas preta por roli kiel internacia lingvo de la homaro? Ni ja ofte povas legi asertojn de intelektaj esperantistoj, ke al Esperanto mankas multaj fakaj esprimoj, kiujn bezonas nia epoko. Jes ja, sed kiamaniere la modernaj lingvoj akiris tiun esprimopovon? Komunikante pri siaj fakoj en la lingvo! Praktiki, tio estas la nura maniero teni

lingvon preta por taŭga uzo. Verki (aŭ traduki) altnivelajn artikolojn pri la problemoj, ekonomiaj, politikaj, sociaj kaj civilizaciaj, de nia mondo, tio estas nia maniero igi Esperanton preta por sia rolo.

Nia postulato estas ke ĉio tradukeblu en Esperanton, same kiel en la aliajn lingvojn. Ĉar ni celas esti komprenataj de la plej granda nombro da esperantistoj, ni uzas lingvaĵon ja altnivelan, sed laŭ la lingva materialo simplan, kiom eble plej proksiman de la oficiala radikaro.

Nu, ni esperas viajn regulajn vizitojn sur la retejo, se eble komentojn (sub ĉiu artikolo vi povas per simpla alklako aldoni vian komenton) kaj, kial ne?, kunlaboradon en la tradukado kaj kontrollegado. **Jeanne-Marie Cash**



Nomoj kaj homoj



Antaŭ nelonge mi rimarkis ke mi forgesis la nomon de esperantisto kiun mi tamen bone konas. Ĉu signo de frua Alchejmerno? Poste revenis nomo en mian kapon – tamen, ne la ĝusta nomo. Pripensinte la fenomenon, mi komprenis ke la du koncernatoj havas, krom samlanda origino, tre similan sintenon en movadaj aferoj – jen probable la kialo de mia konfuziĝo.

Estas normale ke, por simpligi al ni la vivon, ni manipulas stereotipojn, projekciante la ecaron de iu jama konato al konato nova. Tiel faradas Miss Marple en romanoj de Agatha Christie, kaj al ŝi tia person-paŭsado helpas solvi murdomisterojn. Sed kian misteron solvu mia konfuzado de nomoj?

Dum pli ol dudek jaroj da movada vivo, el kiuj unu jardeko verdul-profesie densa, mi diversgrade ekkonis centojn, iomete eĉ milojn, da esperantistoj. Aparte bone mi konatiĝis kun iliaj tekstoj, kiujn mi redaktis. Kiel redaktoro, mi aparte aprezis alportantojn de ideoj originalaj, kaj mi ankoraŭ naive kredis ke la legantoj same sentas.

Baldaŭ mi devis konstati: ne nur ke sama homo emas ripeti samajn ideojn, turne kaj returne kiel lavmaŝino, sed eĉ la ideoj mem revenas kaj recikliĝas – parte ĉar ĉiam alvenas anoj de novaj generacioj. Ili remalkovras kaj retraktas ofte la samajn demandojn kiel iliaj antaŭuloj – sed plej ofte sen konsidero al interkonsentoj kaj sendubigoj jam atingitaj de aliaj...

Ekzamenante la demandon eĉ pli proksime, mi rimarkis ke, krom la ideoj, recikliĝas ankaŭ la tipoj de ideantoj. Kvazaŭ la pensojn kovus ne individuoj, sed iuj eterne revenantaj arketipoj. Koncentrante mian atenton, mi sukcesis fari momentfotojn pri kelkaj el ili. Jen portretoj, sen aparta ordo, el la unua koridoro de mia galerio (kiu multĉambre labirintas plu, kaj kies fundon mi mem ne kuraĝas viziti, ĉar eble mi ne revenus):

La praktikulo. Vojaĝas, komercas, gajnas monon per Esperanto. Malofta tipo, ĉar nekapabla reproduktiĝi.

La finvenkisto. Motivas lin la espero ke poste ne plu necesos kotizi al UEA.

La bonlingvisto. Subtipoj: la kontraŭneologismulo; la simplemulo; la logikemulo; la demokratiemulo. Feliĉe, la subtipoj ne interkonsentas, kaj tio garantias la transvivon de Esperanto.

La ĉasanto de krokodiloj. Kiel Jesuo elpelanta komercistojn el la templo, li reale faras tion pri kio la bonlingvisto nur sonĝas.

La raŭmisto. Tre malfacila rolo, ekde kiam la markonomo estas akaparita.

La lokulo. Foje ekiris al UK sed revenis al la klubo jam el la stacidomo. Subtipoj: la loka veterano; la neforigebla klubestro; la verdeg kroko; la eterna komencanto.

La beletristo. Konsolas sin per la ideo ke, pro la tutmonda ŝrumpo de libromerkatoj, baldaŭ la Esperanta ne plu aspektos tiom nana.

La mojosulo¹. Lia patro dancis bambon, li fondas Vizaĝlibran paĝon pri bambodancado.

La giko². Aldonis Esperanton al komputado por solvi siajn interhomajn problemojn; per nova softvaro eble sukcesos.

La aktorino. Finfine trovis medion kie ŝi estas pli ol figuranto.

La geniulo. Ekzistas unu, sed li kreis ĉirkaŭ si kompletan ŝtaton por ne senti sin sola.

La frustrito. Ĉiam kapablas trovi novan plendomotivon. Subtipo: "mi mortos antaŭ la fina venko".

La kongresano. Subtipo kiu daŭre serĉas sian tipon. Kaj la salonon de la sekva programero.

La gravulo. Subtipoj: la podiemulo, la reciklebla estrarano, la omaĝlibrato.

La akademiano. Plej proksima al *homo sapiens*, sed ne facilas scii en kiu direkto. Subtipo: la ekskuzito pri akuzativ-uzado.

La fripono. Komprenis ke la meza naiveco de esperantistoj ebligas daŭripovan parazitadon. Povas evolui kaj iĝi kanajlo.

La kabeinto. Subtipoj: la kabeado; la kabe-minacanto; la ekskabeo.

"Kaj multaj aliaj, kiuj simple tie loĝas." (Heinz Kahlau)

Evidente, eblas ankaŭ miksaĵoj, kiel la frustrita aktorino, la mojosa giko, la ekskabea podiema beletristo, kaj longe tiel permute plu. Almenaŭ, dum temas pri la aliaj. Ĉar sin mem ĉiu el ni kredas individuo unika, ne senplue klasebla, kun impona komplikoj kaj kompona implikoj, tutmonda umbiliko – amen. Movadu ni tamen.

István Ertl

Elstara libro al elstara homo

La arto labori kune. Festlibro por Humphrey Tonkin. Red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins. Rotterdam: UEA, 2010. 901p. 26cm. Bind. Ilus. ISBN 9789290171133. Prezo: € 60,00

Mejloŝtono en la esplorado pri la temoj ĉirkaŭ Esperanto

Sekcioj IV-VI (p. 257-581)

Kiel sufiĉe juna kunlaboranto de Humphrey Tonkin, estas por mi honoro recenzi la duan trionon, pli ol 300 paĝojn, de la festlibrego al li dediĉita. Estante kontribuinto pri lingvopolitiko kaj lingvoplanado (sekcio II), mi recenzos alian parton, konsistantan el tri sekcioj: esperantologio (IV), historio (V) kaj movado kaj komunumo (VI). Mi klopodos arigi la kontribuojn laŭ la temoj tuŝitaj kadre de ĉiu sekcio, por evidenti laŭeble la plej interesajn rimarkojn kiujn leganto povas trovi. Temoj pri simpla gustumado, ĉar 31 kontribuoj entute postulus ne unu, sed tri recenzojn.

Ne pre pro miaj personaj emoj mi trovis tre interesa sekciojn IV dediĉitan al esperantologio. La atento de Wim Jansen, Boris Kolker, Geraldo Mattos kaj Klaus Schubert fokusigis en la fundamenta lingvo, pli precize, en tio kio estis priskribita de L. L. Zamenhof en la *Unua Libro* kaj en la *Fundamento de Esperanto*. Pli precize, Jansen alfrontas la problemon de la tipologia klasifikado de Esperanto: ĉu – kaj jeskaze kiom – Esperanto estas eŭropa lingvo? Lia metodo estas preni tipologie konatajn interlingvistikajn trajtojn pri (hindo-)eŭropeco de lingvo kaj apliki ilin al la fundamenta lingvo. La plej interesa rezulto miaopinie estas, ke "okulfrapan diferencon inter Esperanto kaj la referenclingvoj ni trovas en... aspektoj de la morfologio, kiu ŝajnas esti unikaĵo, retrovebla nek en Eŭropo nek ekstere." Krome Jansen montras kiel neatenditaj komunaj trajtoj kun lingvoj kiuj ne estas referencaj al Esperanto (kiujn Zamenhof tute ne konis), devas esti rigardataj tre singardeme. Sur la sama linio, Kolker malkaŝas la gravecon de la rolo de la rusa en Esperanto, "kiel decida kontrolo lingvo, t.e. de lingvo-formilo", ĉar tute probable la rusa estis la ĉefa lingvo de Zamenhof, kaj fakte eŭropismoj eniris Esperanton tra ĝi. Malpli konvinka estas la kontribuo de Mattos, kiu relegas la fundamentan lingvon kompare kun la portugala, kaj pridiskutas la nekoheron de la originala partecipa sistemo, fakto vaste konata kaj solvita de specifa lingvoplaniga ago fare de Akademio de Esperanto pli ol 30 jarojn antaŭe. Male Schubert prezentas investigadon pri la koncepto 'vorto' en la planlingva antaŭvivo de Esperanto, el la kabineto de Zamenhof, enfokusigante la faman eltiraĵon pri la plena dismembriĝo de la ideoj en memstaraj, senŝanĝaj vortoj, tute fremda por la eŭropaj popoloj, sed al ilia spirito alkonforme por ne malfaciligi la lernadon de la lingvo. Tiu ĉi eltiraĵo



montras al ni, kiel multaj planlingvaj premisoj de Esperanto estas implicaj, kaj spegule kiel la plejparto de neplanitaj trajtoj estu afero lasita al la lingva uzo, kio estas surprize nuntempa percepto de lingvo el lingvoplanada vidpunkto.

Sed esperantologio ne estas nur analizado de la zamenhofa lingvo: Ken Miner, Christopher Gledhill kaj John Wells analizas la lingvon tra la lensoj de modernaj lingvistikaj ilaroj, dum Ilona Koutny, Aleksandro S. Melnikov kaj Till Dahlenburg alprenas pli socilingvistikajn vidpunktojn. Fine, en kompara lingvistiko ni povas enmeti la kontribuojn de Renato Corsetti, Otto Prytz kaj Michel Duc Goninaz. Miner prenas la vidpunkton de lingvistiko

fare de Chomsky, montrante kial por la fama usona lingvisto Esperanto ne estas proprasence lingvo (esence, ĉar denaskuloj ne estas *native speakers* [denaskaj parolantoj] en la normala senco de la esprimo). Gledhill sekvas la modelon de la britaj skoloj de Firth pri "kunokazemo" (*collocation*) kaj de Halliday pri leksiko-gramatiko por korpuse analizi la diferencon inter analizaj formoj kiel 'havi okazon' kaj respondaj sintezaj kiel 'okazi'. Wells sin demandas ĉu la diversaj frazmelodioj de la etnaj lingvoj posedataj de esperantlingvanoj povas starigi problemon al la lingvo mem. Feliĉe, en la plej tikla parto de frazmelodio, t.e. demandomelodio, Zamenhof elektis la polan vojon, pruntante la vorton *czy* (ĉu) anstataŭ fidi je frazmelodiaj rimedoj kiel ekzemple en la itala. Do, ĝenerale dirite, ne fidu tro je frazmelodioj kiam vi parolas Esperante. Koutny prezentas malgrandan retan enketon (10 demandoj kaj 100 respondintoj estas sampla bona por sugesti tendencojn) pri la bildo de la mondo laŭ esperantlingvanoj. Kiom da influo havas la etnaj lingvoj en ilia semantika mapo, ekzemple en la kolornomoj? Kiom da kono pri la Esperanta kulturo necesas por kompreni kelkajn esprimojn (ekz. 'kabei')? Unu nepra konkludo estas la tendenco uzi sintezajn formojn kiel 'malsati' anstataŭ analizajn, kiel 'havi malsaton'. Melnikov prenas alian vojon por montri la realecon de la Esperanta kulturo, kies speguloj estas la gazetoj, speciale en specifaj trajtoj kiel esperantonimoj. Aparte interesa estas la semiotika analizo de la bildoj uzataj en la gazetaro: ne nur lingvouzo, sed lingvouzo kune kun desegnaĵoj. Dahlenburg argumentas, ke la alproprigo de la etnolingvaj parolfiguroj al Esperanto per poezio riĉigas la lingvonivelon de la poezi-leganto. Kvazaŭ rekte responde, Corsetti argumentas, ke ekzistas supertavola lingvo por esperantlingvanoj, nome la plej prestiĝa nacia lingvo de la momento (nun, la angla), komparante Esperanton kun kreolaj lingvoj. Pri la tiel-nomata kreoliĝo de Esperanto, mi tute dubas, ĉar kreoliĝo postulas piĝinon kaj Esperanto neniam estis piĝino sed ĉiam planlingvo: mi preferus

nomi la fenomenon 'naturiĝo'. Ĉiukaze, aparte de harfendaj diskutoj pri la plej oportuna termino, multaj observoj fare de Corsetti estas atentvekaj kaj diskutprovokaj. Prytz analizas la diferencon inter la etnolingvaj sufiksoj, kiuj ne povas roli kiel memstaraj radikoj, kaj la Esperantaj, kiuj ja povas, sed kelkaze la vortkombinoj leksikiĝis (ekz. 'homaro' indikas ĉiujn homojn, ne laŭkombine 'aro da homoj'). Kiel etnolingvajn studkazojn li prenas la hispanan, anglan, germanan kaj rusan etnolingvojn. Finas la sekcion eseeto de Duc Goninaz, kiu alfrontas la problemon de tradukado el lingva vidpunkto, nome ĉiu dulingvulo havas iom da interfero inter la lingvaj sistemoj, kiuj povas eĉ grave influi la proceson de tradukado. Bedaŭrinde li ne profundigas la specifajn problemojn malantaŭ tradukado en kaj el Esperanto, temo miaopinie ankoraŭ malmulte esplorata sed fakte esplorinda.

Sekcio V enhavas kontribuojn pri la historio, buntajn kaj atentveajn. Eĉ ĉi tie ni povas arigi ilin laŭ kelkaj temoj: Zamenhof kaj la pionira epoko (Christer Kiselman, Marc Bavant, Carlo Minnaja, E. James Lieberman); pri la malneŭtralisma movado (Ulrich Lins, José Antonio del Barrio, Vladimir Samodaj); pri specifaj historiaj epizodoj kaj kuntekstoj (Doron Modan, Vlastimil Novobilský, Tacuo Huĝimoto, Shi Chengtai, Ed Borsboom). Kiselman prezentas la ideojn de Zamenhof pri la neŭtrale-homa religio de la frua hilelismo (1900) ĝis la matura homaranismo (1917). Bavant relegas la zamenhofan eseon pri esenco kaj estonteco de la lingvo internacia preskaŭ jarcenton post ĝia aperigo. Ĉu ĝi ankoraŭ validas? Laŭ la aŭtoro la zamenhofa pretendo ĉion solvi per la "nuda logiko" fiaskis, kaj pro tio stariĝas la demando ĉu la eseon ne verkis de Beaufront anstataŭ Zamenhof. Minnaja prezentas al ni ege interesan rigardon al lingvokontrolado antaŭ la starigo de la Lingva Komitato, en la diskuto inter la legantoj de la unua revuo, *La Esperantisto*. Ekzemple, kelkaj lingvaj trajtoj de la antaŭbulonja lingvo, nome ankoraŭ sen netuŝebla Fundamento, perdiĝis por reaperi poste kiel avangardaj fenomenoj! Lieberman klopodas skizi psikologian analizon de la personeco de Zamenhof laŭ klasika freŭda vidpunkto kaj priskribi la psikologojn kiuj subtenis la lingvon, interalie Auguste Forel, Pierre Bovet kaj John C. Flugel, kiuj eĉ estris kurson ĉe la unua Somera Universitato en Genevo (1925). Oni povas diri, ke la historio de la frua epoko de nia lingvo ankoraŭ estas priesplorinda. Lins reprenas la enketon de li faritan en la jaroj 1982/83 inter komunistaj esperantistoj pri la trajtoj de ilia "duobla lojaleco". Temas pri 30 demandoj al 79 homoj, multaj naskitaj antaŭ la Unua Mondmilito. La rilato inter la du ismoj estis plejofte malfacila, ĉar ilia vivo estis entute nefacila. Esperanto rolis precipe kiel persona klerigilo. Eble ne tro surprize la ekstera socio (komunistoj ne-esperantistaj) tute vidis esperantismon kiel kromajon. Post la disfalo de Sovetunio, multaj el ili vivis tragedian momenton, kaj Esperanto rolis kiel postrestaĵo de la idealismo. Kvazaŭ komentario, Samodaj atestas pri la vanaj klopodoj eldoni Esperantan revuon en Sovetunio en la 1970/80-aj jaroj, eĉ kiel 'angulo de esperantisto' kiel suplementon de jam starigita anglalingva revuo, *Moskvaj Novaĵoj*. Nur provekzemplerio sukcesetis. Del Barrio klarigas kial hispanaj laboristoj emis lerni Esperanton en la komenco de la 20-a jarcento. Resume oni povas diri, ke krom la volo klerigi la malaltaj klasoj emis krei novan, alternativan klasbatalan kulturon per malnacia lingvo, nome Esperanto. Socialistoj emis substreki la klerigon dum anarkiistoj la alternativan novan kulturon. Modan enkondukas la leganton en specialan momenton, en kiu Esperanto rolis vere kiel superetna lingvo de paco: la Palestina kaj Egipta areo antaŭ la milito de 1948/49. Tiam araboj kaj judoj uzis la lingvon

praktike por konstrui zamenhofan neŭtrale-homan ponton inter la du popoloj. Tute diversan fonon prezentas la kontribuo de Novobilský pri la personeco de Ota Ginz, elstarulo en la esperantista movado en Ĉeĥoslovakio. Estis por mi surprize kaj kortuŝe ekscii pri Esperanta-ĉeĥa vortaro kompilita en getto.

Nun, de proksima Oriento al fora Oriento. Huĝimoto prezentas al ni la vivon de Takagusi Itirō, interalie tradukinto en la japanan de *Kumeŭaŭa* de Tibor Sekelj, unu el la plej famaj infanliteraturaĵoj en Japanio, kaj de Eroŝenko, la konata blinda poeto. Shi enkondukas la leganton en la misteran personecon de Elpin, koreo kiu longe vivis en Ĉinio kaj multe engaĝiĝis kontraŭ la japana invado. Finas la sekcion la kontribuo de Borsboom, kiu pritraktas la historion de la juna movado ekde 1938 ĝis 1958, kiam ekaperis junulo kiu ege influos la junan (sed ne nur) movadon: Humphrey Tonkin. Interese, mi eksciis, ke la hazardemo de partoprenantoj en la junaj internaciaj kongresoj ja ne estas novaĵo.

Sekcio VI estas malgranda kompare kun la aliaj ĉianalizitaj (malpli ol 70 paĝoj entute), tamen ne seninteresa, ĉar ĝi pritraktas du strebojn de la esperantismo: movadon kaj komunumon, kiuj ne ĉiam paceme kunvivis. Werner Bormann efike pritraktas la distingon inter labori *por* Esperanto (movade) kaj labori *per* Esperanto (komunume), kun speciala atento al la frua epoko de UEA, kaj (denove) oni vidas, ke foje akraj lastatempaj diskutoj enradikiĝas en la fondiĝo de la moderna, postpionira movado. Jorge Camacho profundigas en la afero, vigle diskutante la tradician nocion de 'Esperanta popolo'. Ĉi tiun oni interpretu metafore, samkiel 'la futbala popolo'. Sed metaforoj plenas de danĝero, kiam ni forgesas la metaforecon kaj permesas al ili plasmii nian pensmanieron. Pro tio, li proponas anstataŭigi la esprimon per 'Esperanta malpopolo'. Stariĝas do la demando, ĉu entute ekzistas Esperanto-kulturo. La respondo de la aŭtoro jenas: bezonatas lingva malaparteco por krei universalan, mondiskalan kulturon, nome esperantistoj devas daŭre dialogi kun la alilingvaj kulturanoj por diri ion vere universale valoran. La kontribuoj de Zbigniew Galor kaj Nikola Rašić estas sociologiaj esploroj pri la ĝenerala movado, dum Hèctor Alòs i Font pritraktas la katalunan. Galor prezentas superrigardon de sociologiaj esploroj rilataj al la konsciado de la UEA-membroj pri la asocio mem, speciale diskutante la koncepton de Diabla Cirklo de Eckhard Woite, nome la tendencon de UEA ekzisti por pluvivi kiel memcelo anstataŭ ekspluati la originajn celojn. Kvazaŭ responde, Rašić analizas la Universalajn Kongresojn, eble la plej fortostreĉan ĉiujaran laboron de UEA. Per statistika ellaborado, ŝajnas fakte, ke la komunumo pli pezas ol la movado, alivorte UK iĝas "fermema kongreso de malferma movado". En 2007, por doni sociolingvistikan bildon, Alòs i Font faris enketon inter 98 katalunaj esperantistoj, kiuj estas ĉefe viraj, kleraj, diversaĝaj, ekonomie mezklasaj kaj poliglota. Fine Ziko van Dijk komparas la ideologiojn malantaŭ Vikipedio kun tiu malantaŭ Esperanto, kun speciala atento al la esperantlingva Vikipedio, relativa sukceso se oni rigardas aliajn Vikipediojn subtenatajn de pli-malpli samnombraj lingvaj komunumoj.


Ĉiosume, ĉiu sekcio povus valori kiel memstara monografia volumo. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉi tiu libreto estas mejloŝtono en la esplorado pri la temoj ĉirkaŭ Esperanto. Sekvaj pluesploroj ne povos ne sin referenci al unu aŭ alia kontribuajo de la festlibro, kaj do mi sincere rekomendas posedon al ĉiu esploranto aŭ esploronto pri la lingvo, la historio kaj la movado.

Federico Gobbo

(Recenzo pri la lasta parto de la libro aperos en la sekva numero de la revuo).

Memoro pri la Nakbo: Ĉu la libro de la jaro?

Kiel Israelo elpelis la palestinanojn (1947-1949). Dominique Vidal kaj Sébastien Boussois. Embres-et-Castelmaure: Monda Asembleo Socia (MAS), 2009. 361 p. 21cm. ISBN 9782952953764. Prezo: € 21,00



En 2007 aperis la franclingva originalo de tiu ĉi libro, nun tradukita de Vilhelmo Lutermano. Verkis ĝin la franca historiisto kaj ĵurnalisto Dominique Vidal, mem de sefarda familio, regula kunlaboranto de la revuo *Le Monde Diplomatique* (kun interreta eldono en Esperanto ĉe <http://eo.mondediplo.com/>).

Anstataŭ proponi novan tezon, Vidal prezentas la kontribuojn de la t.n. "novaj historiistoj" israelaj, kiel Benny Morris, Ilan Pappé k.a. Ekde la mezo de la 1980-aj jaroj, ĉi tiu generacio de judaj historiistoj sukcesis malkonstrui la tabue oficialajn mitojn pri la fondo de la ŝtato Israelo kaj pri la milito unue inter la judoj kaj la araboj de la britmandata Palestino (tiutempe la vorto "palestinanoj" kunsignifis ilin ĉiujn), poste inter Israelo unuflanke kaj la palestinanoj kaj arabaj regnoj najbaraj aliflanke, dum la periodo 1947-1949.

Kiel diras la enkonduko, "inter la plano de divido de Palestino adoptita de la Ĝenerala Asembleo de UN la 29-an de novembro 1947 kaj la armisticoj de 1949 sekve al la unua israela-araba milito, komencita per la invado de la 15-a de majo 1948, plurcent miloj da palestinanoj, kiuj vivis sur la teritorioj fine okupotaj de Israelo, forlasis siajn hejmojn." Laŭ la tradicia israela historiografio, la rifuĝintoj (ĝiatakse maksimume 500 000) plejparte fuĝis libervole aŭ sekvante alvokojn de gvidantoj promesintaj rapidan revenon post la venko; por la historiistoj arabaj kaj palestinaj, la granda plimulto (700 000-900 000) estis elpelitaj pere de masakroj en la kadro de politika-milita plano. Konsultinte dokumentojn, arĥivojn, taglibrojn ktp de la israela armeo kaj/aŭ de israelaj gvidantoj kiel David Ben-Gurion, la "novaj historiistoj" pravas la ekziston de tiuj mature pripensitaj plano kaj elpelo.

Vidal prezentas la rezultojn de tiuj esploroj kronologie. Unue tiujn de Morris, al kiu li dediĉas la plej grandan parton de la verko, ĉar li la unua detale analizis i.a. la planon Dalet, la masakron en Dajr Jasin aŭ la ĉefrolon de Ben-Gurion en tiu "elpuriga", popolforŝova politiko. Per tio klariĝas la kialoj de la fenomeno, ke la palestina popolo transformiĝis al popolo de rifuĝintoj. Poste legeblas la kontraŭaj argumentoj de la t.n. ortodoksaj historiistoj (same judaj aŭ israelaj), subtenantaj la oficialan version pri la israela historio. Trans la mezo de la verko, la prezento de la nunaj ekstremdekstraj politikaj ideoj de Morris ne kiel historiisto sed kiel individuo transformas la libron kvazaŭ en romanon. Vidal, ne senpartia, komunikas al ni sian ŝokiĝon kaj tiun de aliaj esploristoj.

Sekvas i.a. Pappé, politike ekstremliva, kaj tiurilate radikale malambigua ankaŭ kiel historiisto. Liaj verkoj relegas la periodon jam studitan de Morris el ankoraŭ pli nova, nemiskomprenebla perspektivo. Fine, la emocia postparolo de Sébastien Boussois unue rakontas skize la viv-itinerojn de tiuj du kaj de la ceteraj similinaj aŭtoroj, ekde Simha Flapan ĝis Avi Šlaim, Tom Segev aŭ Akiva Eldar, kaj poste traarkas la historion de la israela okupado de Palestino ĝis la plu opresa kaj sanga nuntempo.

Legeblas en la antaŭparolo de Yehuda Lancry ke "la renaskiĝo de Israelo kaŭzis nacian katastrofon por la palestinanoj". Laŭ la araba

lingvo, oni povas nomi tiun katastrofon la Nakbo. Samkiel ni ekdisponas en Esperanto komune verkitajn librojn pri la historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio antaŭ kaj dum la dua mondmilito, Vilhelmo Lutermano faris grandan servon tradukante ĉi imponan verkon. La 350-paĝa traduko legeblas flue, tamen oni permesu al mi parentezon kun lingvaj kaj stilaj atentigoj.

Unue ĝenas la ĥaoso aŭ la manko de sistemo transskribi hebreaĵojn kaj arabajn nomojn. Kial uzi malsamajn formojn en apudpaĝaj mapoj? Kial prezenti en tabelo eĉ 4 nomformojn [Jenino, Ĝanin(o), Ĝinin(o), Ĝenin(o)] por unu sola urbo? Ĉu Jiŝuf, Jiĥuv kaj Jiŭv signifas la samon (la judan komunumon de Palestino antaŭ 1948)? Kial ne Jiŝuv(o)? Pli bone estintus prezenti tabelojn kun, unue, la transskribaj kriterioj kaj reguloj, kaj due la listo de transskribitaj nomoj, por konsulto (kaj por ne devi ripeti la klarigon plurfoje tra la verko). Ekzemple, sur tabelo oni povus vidi ke Ramlo = Al-Ramla [arabe] / Ramleh [hebree], aŭ ke Ĥalilo/Ĥebrono [ne Hebrono] = Al-Ĥalil/Ĥebon, kaj poste en la teksto mem legeblus nur Ramlo kaj Ĥalilo/Ĥebon (kvankam por plej multaj nomoj sufiĉas ne esperantigo sed transskribo).

Koncerne personnomojn, kiel Theodor Herzl (kies verkon *La juda ŝtato* publikigis *Literatura Mondo* en 1934) meritu la strangan esperantigon "Theodoro [kun h:] Herclo"? Aŭ kial nur sur p. 326 ni eksciuj ke la oftege uzata nomo Beni Moris estas transskribo de la bibliografie pli utila nomformo Benny Morris?

Due, ĝenas ankaŭ la uzado de la artikolo antaŭ nomoj jen de organizoj (la Hagana, la Irgun) jen eĉ de loknomoj (la Negevo, la Jordano, la Golano anst. Negebo, Jordano, Golano).

Trie, naci-lingvajn esprimojn kaj titolojn de verkoj prefere akompanu Esperanta traduko.

Kvare, jen listo de misvortoj kaj aliaj eraroj: konfiguraĵo (formaĵo), amplifikita (amplifita), kreskanto (lun-arko, krescento, kreskluno), delokitulo (delokitoj), milico (milicio; sed eble notinda en vortaroj kiel konkurenca formo?), logistiko (loĝistiko), bazoko (bazuko), interferenco (interveno), getoigo (getigo), Rodoso (Rodo/Rodiso), Birmanio (Birmo), transfer[i] (transigi), ĉerkaso (ĉerkeso), ĥarisma (karisma), Kambriĝo (Kembriĝo), Levantio (Levantenujo?); "kaŭzo" anst. "afero" ("reprezentantoj de la palestina kaŭzo"), "granato" anst. "grenado", "ŝerifo" anst. "ŝarifo", "nuancigi" anst. "nuanci",

"koloniigo" anst. "koloniado", "topografiisto" anst. "topografo", "balanco" anst. "bilanco", "venenigi" anst. "veneni"; "*haŝimia" apud "haŝimida" (foje eble sufiĉus "haŝima"), "mukhtar-o" apud "muktar-o" (muĥtar-o? t.e. araba vilaĝestro); Gŭatemalo kaj Urugŭajo (kontraste Lutermano foje transskribas la araban ŭ per v: Walid = Valid); transitiva misuzo de "indigni"; "post" kaj aliaj prepozicioj senpere antaŭ infinitivo (anst. "post kiam, post ol"); daŭra uzado de "komenci" anst. "komenciĝi". Cetere, oni uzu "partizano" prefere nur en ĝia dua NPIV-a signifo (militpreta armita civilulo) ol en la unua, ĉar por ĉi lasta ni jam disponas "partiano". Kaj, krome, kion signifas ke "la gazetaro kovris aferon"? Ĉu oni ĝin traktis aŭ kaŝis?

Kvine kaj fine, vortaristoj notu, krom la jam menciitan "milico", la vortojn "intifado" (p. 47, 344), "Betleĥemo" (p. 88; meza formo inter la zamenhofa "Betleĥem" kaj la NPIV-a "Bet-Leĥemo"), "ĝihado" (p. 99), "urĝoleĝo" (p. 109), "makartismo" (p. 280, 345), "legitima" (p. 344).

Ĉio antaŭa estas bagatelo kompare kun la graveco de ĉi verko, tiom valora por nia plukompreno de la mondo, ke mi nomus ĝin senhezite la libro de la jaro 2009. La jam menciita Eldar diris jenan frazon: "La rekono de tio kio okazis en 1948, kiel montris ĝin la 'novaj historiistoj', estas antaŭkondiĉo por la paco kaj por la intertraktadoj". Kaj ilia ver-esplora laboro, en vortoj de Lancy "estas devo, morala devo".

Jorge Camacho

Verko kiu meritas respektan atenton

Yvonne. Sonetoj malsekretaj.

Timothy Brian Carr. Rotterdam:

Bero, 2009. 251p. 18cm. Prezo:


15,90 €

La titolo *Yvonne*, virina nomo; la subtitolo *Sonetoj malsekretaj* aludas al "Sekretaj sonetoj" de Kalocsay, tiu legaĵo sinripete enuiga malgraŭ ĝia forma perfekteco. Kio pri la 224 sonetoj, kiuj rekte aŭ nerekte estas dediĉitaj al Ivona? Mi tuj diru, ke ili certe ne estas enuigaj, savas ilin la persona tono ĉie konstatabla, kontraŭe al la Kalocsajaj, kaj pli da tema varieco; tamen ili, okaze, povas efiki lacige, sed ne nepre en negativa senco.

Kiu estas Ivona? Franca knabino, kiun ekvidis enamiĝe dekkvinjara knabo, kiu nutris tiun amon tra sia vivo, same kiel Petrarka sian amon al sia Laura. Kaj kiel Petrarka rakontis sian vivlonge tenatan sperton en la Canzoniere, Timothy Brian Carr rakontas sametose pri sia neforgesebla amo al sia Ivona. En soneto titolita dudekajarcenta "Petrarkisto" la poeto demandas: "Sed kiel mi min klasu kun Petrarko?" kaj respondas "Kiel? Per amo – ĉiamdaŭra sparko –" kaj komentas konklude: "Mi faras min Ivona-industrio!". Tiu komento havas ironian tonon, estas kvazaŭ la poeto, almenaŭ en tiu verkmomento, iel oblikve konsiderus sian sonetaran produktadon kiel ian metian transformadon. Sed ĉu nur metio, industrio?

Ne estas tiel. La "Sekretaj sonetoj" de Kalocsay pritraktas virinon kiel cedeman objekton por amorado, la malsekretaj sonetoj de Timothy Brian Carr prezentas sian virinon kiel neatingeblan idealon. Tio ekipas lin per multe pli vastaj kaj variaj eblecoj de esprimado ol konstatablas en la sonetaro de Kalocsay. Malsimilaj sintenoj de la du poetoj al la temoj faras ĉi tie decidan diferencon. Unu estas enfermita inter siaj objektaj limoj, la alia ebligas aliron ĉiudirekte en tempo kaj spaco.

Multaj sonetoj estas datitaj taglibre, rilate al la enhavo de la poemoj. Tiel 29 el la komencaj poemoj havas la



daton 1958, la jaron de la Ekkoniĝo, kiam la estonta Esperanto-poeto estis 15-jara. Tiuj datoj donas informojn, sed efektive ne necesajn, la aĝo de la knabo klare aperas en iuj poemoj, ekzemple en "Jen mi dekkvinjaraĝa" (p. 36), la tuta ciklo sufiĉe informas pri si mem, pri la komenco, pri la evoluo ĝis la lasta poemo, kiu retrosendas ĝis 1957: "Post naŭ monatoj mi Ivonan vidos". La poeto tiel fermas la cirkon, per la prakomenco.

Kvankam la poemaro estas esence amevolua rakonto, kiel ja atestas ĝia titolo, la temo ofte devias ja alidirekte: ankaŭ vojaĝoj, muziko, kino, futbalo, havas tie siajn lokojn, kvankam la amrakonto neniam longe forestas. Notoj estas pri diversaj, sed ne sufiĉaj, amaso da nomoj de personoj, lokoj kaj eventoj tie aperas sen notaj komentoj. Tiaj aludoj lacigas, sed povas efiki kiel defioj al esploro, se ne tuj, tiam poste, se oni celas plenan komprenon.

El arta vidpunkto la sonetoj de Timothy Brian Carr estas atentindaj; li tie iras siajn proprajn vojojn, ne nepre sekvante tiajn konvenciajn "regulojn" de la soneto, kiel ekzemple tiujn de malfermo de la temo, ĝia ellaborado, ekzemplo kaj konkludo. Esence la poezio de Carr estas impresionisme elokventa, kio ja havas siajn riskojn, sed ankaŭ ofte surprizojn, kiuj povas efiki aŭ kiel ĝueblaj sparkoj aŭ kiel neagrablaj ĝenoj, depende de la leganto. Bildara troŝarĝemo ne faciligas la legadon, sed pacienca leganto certe klopodas trairi tiajn densaĵojn kaj trovi tie valorojn.

La Ivona-libro de Carr estas atesto de obsedo, kiu trovas sian esprimadon en necedema volo al kontentiga rezulto, ĉiu ŝtupo pelas la poeton al ĉiam nova ŝtupo, tamen ne nepre progresiga; la procezo ŝajnas senfina; oni demandas sin, kiam elĉerpiĝos la fortostreĉoj de la poeto. Al mi persone la akumula efiko de la poemaro estas tiu de mirmiksita admiro pri la kapabloj de la poeto nutri sian inspiron per senlaca elĉerpado de la temo, rezultiganta verkon, kiu meritas respektan atenton.

Baldur Ragnarsson

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Angelmonto. Conrad Ferdinand Meyer. El la germana trad. W. Nüesch. Berno: La tradukinto, 2010. 74p. 21cm. Ampleksa poemo (versa rakonto) de ĉefa figuro de la svisa literaturo germanlingva. € 6,00

Beletra Almanako 8 (Junio 2010). Red. J. Camacho, P. Daŝgupto, I. Ertl. Novjorko: Mondial, 2010. 165p. 22cm. Ilus. ISBN/ISSN 9781595691729/19373325. Prozo originala kaj tradukita, poezio originala kaj tradukita, eseoj, artikoloj kaj recenzoj. € 9,90

Bildstrioj kiel lernolibroj, La. Michel Dechy. Villeneuve-d'Ascq: La aŭtoro, 2010. 32p. 30cm. Kolorilus. Lernolibro bazita sur bildstrioj. Kun abundo da informoj, ekzemploj kaj ekzercoj. € 6,00

Cis morto. Antanas Mekys. Vilnius: La aŭtoro,

2009. 164p. 21cm. Bind. ISBN 97860940880531. Rememoroj de litova esperantisto, traktantaj la periodon 1922-2009. € 15,00

Ĉashundo de la Baskerviloj, La. Arthur Conan Doyle. El la angla trad. W. Auld. Kaliningrado: Sezonoj, 2010 (2-a eld). 167p. 20cm. Unu el la plej famaj detektivaĵoj de Ŝerloko Holms. € 15,00

Ĉu fuĝi el la historio? La rusa kaj la ĉina revolucioj hodiaŭ. Domenico Losurdo. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 199p. 21cm. ISBN 9782918300267. Provo klarigi la stalinismon kaj la politikon de la ĉina komunisma partio, kadre de la respektivaj historiaj kuntekstoj. € 14,10


Dek gazetoj. A. Korĵenkov, A. Künzli, H. Gorecka, I. Ertl, S. Meester. Kaliningrado / Kaunas: Sezonoj / LEA, 2010. 31p. 21cm. ISBN

9786099508719. Koncizaj prezentoj de 10 gravaj periodaĵoj en Esperanto. € 4,50

Dek libroj. A. Korĵenkov, H. Gorecka, A. Künzli, R. Haupenthal, C. Minnaja. Kaliningrado / Kaunas: Sezonoj / LEA, 2010. 31p. 21cm. ISBN 9786099508726. Koncizaj prezentoj de 10 ĉefaj Esperantaj libroj. € 4,50




Dek tagoj de kapitano Postnikov. Mikaelo Bronŝtejn. Moskvo: Impeto, 2010 (2-a eld. reviziita kaj korektita). 352p. 22cm. Ilus. Bind. ISBN 9785716102118. Historia romano kun Esperanta fono. € 28,00

Esperanto en Sarlando. De la komencoj ĝis 1988. Reinhard Haupenthal, kun kontribuoj de Ernst Meyer, August Omlor, Jakob Schenkel. Bad Bellingen: Iltis, 2010. 64p. 30cm. Ilus. ISBN/ISSN 9783932807824/18660622. € 16,50



Esperanto kaj Vivo. Vladimir Samodaj. Moskvo: Impeto, 2010. 247p. 20cm. Ilus. ISBN 9785716102125. Epizodoj el la vivo de esperantisto aktiva en Sovetunio kaj Rusio. € 18,90

Esperanto por el método directo, El. Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la hispanan trad. A. Casquero. Martin: La aŭtoro, 2010. 114p. 25cm. ISBN 9768089312160. Komplete ilustrita 22-leciona kurso por hispanlingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. € 7,50



Fontoj nevideblaj,

La. Baldur Ragnarsson. Novjorko: Mondial, 2010. 127p. 22cm. ISBN 9781595691743. Poemoj plejparte verkitaj inter decembro 2008 kaj januaro 2010. € 9,90

Hasegawa Teru ali- nome Verda Majo (1912-1947).

Gotelind Müller. El la germana trad. R. Haupenthal. Bad Bellingen: Itlis, 2010. 23p. 21cm. ISBN/ISSN 9783932807855/18660622. Paĝoj pri japana esperantistino en la ĉina kontraŭjapana rezisto. € 4,20

Itlis – Bibliographie einer Verlagsproduktion / Bibliografio de eldoneja produktado. 1968-2009. Reinhard Haupenthal. Bad Bellingen: Itlis, 2010. 36p. 21cm. Du-lingva (germana, E). ISBN/ISSN 9783932807848/18660622. € 6,60

Itlis – Ein Verlag, seine Geschichte, seine Werke / Eldonejo, ĝia historio, ĝiaj verkoj. Reinhard Haupenthal. Bad Bellingen: Itlis, 2010. 74p. 30cm. Du-lingva (germana, E). ISBN/ISSN 9783932807831/18660622. La historio de la eldonejo, bibliografio (kronologia, laŭaŭtoro, laŭtitolo kaj laŭserio), plus ĉapitro pri La Itlisa Skolo. € 19,80

Kajto de Esperanto. Kurisu Kei. Kompilis Shi Chengtai. Huhehot: E-Asocio de Interna Mongolio, 2010. 367p. 21cm. Eseoj de fervora japana esperantisto. Aldone, kelkaj poemoj lin omaĝantaj. € 8,10

Kapitalo, La. Unua volumo. Libro I. Karlo

Markso. El la germana trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2010. 243p. 21cm. ISBN 9782918300144. La ĉapitroj 10-13 de "La produktadprocezo de la kapitalo" – la unua libro de la plej grava verko de Marx, kies influoj sentebblas ĝis hodiaŭ. € 18,00

Karna maŭzoleo, La.

Jonas Lenn. El la franca trad. E. Desbrières, F. Desbrières, G. Martin. Aiglepierre: La Arĝenta Ŝlosilo, 2010. 50p. 17cm. ISBN 9782908254839. Malhela kaj sorĉa omaĝo al la mondo de la "pulp fiction". € 9,90

Latinidaj planlingvoj.

Věra Barandovská-Frank. Paderborn: Akademia Libroservo, 2010. 48p. 21cm. ISBN 3929853175. Konciza rigardo al la latina lingvo kaj al manpleno da planlingvoj bazitaj sur ĝi. € 5,10

Liberaj tempoj. Rakonto pri la ĉiutaga laborista vivo. Eduardo Novembro. Estremoz: La Karavelo, 2010. 123p. 21cm. ISBN 9789899631229. Certagrade ĉi tiu "rakonto" estas dokumento pri Portugalio sub la faŝisma reĝimo. € 19,20

Lingvo kaj menso. Noam Chomsky. Antaŭparoloj de Probal Dasgupta kaj Hiroshi Nagata. El la angla trad. E. Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 2010. 188p. 21cm. Serio "Scienca Penso" n-ro 2. ISBN 9789290171140. Kolekto de eseoj okupiĝantaj pri lingvosciencaj kontribuoj al studado de la menso, formo kaj signifo en naturaj lingvoj, naturo de la lingvo, lingvoscienco kaj filozofio,

biolingvistiko. € 9,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

Lupo Alberto. Silver. El la itala trad. div. Pisa: Edistudio, 2010. 141p. 21cm. ISBN 9788870360868. La bestoj sur la bieno McKenzie, kies ĉefrolanto estas Alberto, estas speguloj de la homo kaj ĝiaj atingoj kaj fiaĵoj. € 7,50

Sidarto. Hinda poezia

rakonto. Hermann Hesse. El la germana trad. D. Karthaus. Novjorko: Mondial, 2010. 126p. 22cm. ISBN 9781595691750. Rakonto pri la vivo de samtempulo de Gotamo Budho, Sidarto, kaj pri lia serĉo de atmano, t.e. de la nedetruibla, unueca kaj eterna esenco de la spirito. € 12,00

Vizaĝoj. Novelaro 2000-

2009. Div. Stockholm: ESE, 2010. 175p. 20cm. ISBN 9789185288366. Kolekto de 29 noveloj (originale) verkitaj de samtiom da aŭtoroj el diversaj mondopartoj. € 18,90

Zamenhof. Biografia

skizo. Aleksander Korĵenkov. Kaliningrad / Kaunas: Sezonoj / LEA, 2010. 64p. 20cm. ISBN 9786099508733. Teksto celata esti tradukita al naciaj lingvoj. € 6,00

NELIBROJ

Glumarko Kopenhago. 96a Universala Kongreso de Esperanto 2011. Rotterdam: UEA, 2010. Folio (10,5x14,5) kun 12 rondaj glumarkoj. € 0,90. Triona rabato ekde 3 ekz.

Ludo de la nuda vero, La. El la nederlanda trad.

Sign & Script. Utrecht: Atalanta, 2010. ISBN 9789073034518. Okdek demandoj pri personaj, filozofiaj kaj banalaj aferoj, por inciteti unu la alian kaj provoki al pensado, por kune interkonigi siajn opiniojn, por ekkoni unu la alian kaj precipe ankaŭ vin, por pliprecizigi aŭ eble ŝanĝi opiniojn. Kartludo. € 7,20

Neĝo. Fabelisto.

Konstantin Paustovskij. El la rusa trad. A. Kerbel. Hajfa: La tradukinto, 2010. Du noveletoj de sovetia aŭtoro proponita por la Nobelpremio pri literaturo; en formato PDF por PC kaj Mac. Komputila KD. € 5,10

Olesja. Piandistristo.

Aleksandr Kuprin. El la rusa trad. A. Kerbel. Hajfa: La tradukinto, 2010. Du noveloj de klasika rusa aŭtoro, daŭre tre populara; en formato PDF por PC kaj Mac. Komputila KD. € 5,10

Suno sur la tablo. Scienc- populara rakonto pri historio de lumigado.

M. Iljin. El la rusa trad. A. Kerbel. Hajfa: La tradukinto, 2010. Porinfana sciencpopulariga rakonto pri la historio de lumigado; en formato PDF por PC kaj Mac. Komputila KD. € 5,10

En la rubriko

Laste aperis menciigas nur tiuj varoj kiuj estas aĉeteblaj de la Libroservo de UEA, kaj kiuj ne menciigis antaŭe en tiu ĉi rubriko. Ni petas eldonantojn de esperantaĵoj sendi al la Libroservo specimenojn de siaj eldonaĵoj kaj informojn pri prezoj, rabatoj, sendokostoj.

DUMVIVAJ MEMBROJ:

Irano: K. Ghadiri. Nov-Zelando: M. Purdy.

SOCIETO ZAMENHOF:

Finnlando: S. Mattlin, T. Tyynelä. Francio: F. Lo Jacomo.

Hispanio: P. Julià. Kroatio: K. & I. Osibov.

DONACOJ

Ĝis la 15-a de septembro 2010:

Ĝenerala Kapitalo: Nederlando: W. A. Verloren van Themaat (heredaĵo) 451,72. *Sumo ĉi-jara:* 451,72.

Konto Afriko: Nederlando: C. & R. Bossong 75,00. Svedio: J. Hammarberg 57,48. *Sumo ĉi-jara:* 984,61.

Fondaĵo Ameriko: Britio: M. Sims 85,37; G. Sutton (agado de A. Nys) 100,00. Svedio: J. Hammarberg 42,35. *Sumo ĉi-jara:* 1243,65.

Fondaĵo Azio: Aŭstralio: H. Green (Indonezio) 50,00. Ĉinio: Anonima 94,08. Japanio: T. Arai, H. Harada, M. Hirotaka, M. Iwai, T. Konisi, K. Kuriki, T. Lin, H. Matubara, T. Matsumoto, H. Mijazaki, Y. Mine, T. Nakamiti, H. Nakamura, A. Nisinaga, M. Tahira – po 18,46; H. Gotoo 54,75; Y. Hotta, M. Isino, Y. Itou, S. Oonisi, T. Saitō, Miyazaki E-Societo – po 18,25; T. Huzita 27,69, F. Inumaru 27,37; I. Katoo 27,69; K. Koichi 36,50; M. Nakajima 46,15; N. Yoshida 33,22; JEI-karavano al AK 8,51. *Sumo ĉi-jara:* 1 683,10.

Fondaĵo Canuto: Nederlando: R. Moerbeek 100,00. Usono: J. Amis 100,00. *Sumo ĉi-jara:* 1 446,20.

Konto Espero (Haitio): Belgio: Legantoj de "Monato" 274,95. Japanio: Ĉ. Doi, S. Ooba – po 9,12; R. Kobashi 18,00; S. Micukaŭa 46,15; Y. Nonomura 27,38; Aŭkcio Kyusyu-a E-Kongreso 42,89. Mongolio: Aŭkcio 6-a Azia Kongreso 200,54. *Sumo ĉi-jara:* 4 663,25.

Libroj por Kubo: Aŭstrio: U. Stecher 10,00. Brazilo: M. B. Vianna 8,47. Britio: G. Sutton 22,48. Finnlando: S. Mattlin 40,00; J. Pietiläinen 100,00. Francio: F. Lo Jacomo 100,00. Germanio: A. Schubert 4,24. Hinda Unio: G. Rao 47,62. Japanio: H. Harada, T. Saitō – po 27,97; M. Tahira 10,00. Kroatio: Anonima 16,95. Luksemburgo: I. Ertl 25,00; B. Moon 200,00; C. Nourmont 100,00. Nederlando: A. & H. Bakker 3 000,00; R. Moerbeek 50,00. Norvegio: G. Jansson – Frykholm 19,46. *Sumo ĉi-jara:* 5 089,07.

Ĝenerala kaso: Britio: Anonima 48,25. *Sumo ĉi-jara:* 608,05.

Al ĉiuj koran dankon! UEA

KOTIZTABELO DE UEA POR 2011

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	14	36	90	54	32	180
Aŭstrio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Belgio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Brazilo/eŭro	5	12	31	19	11	62
Britio/pundo	8	20	50	32	19	100
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	400	2100
Danio/krono	70	180	450	285	170	900
Estonio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Finnlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Francio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Germanio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Greklando/eŭro	8	20	50	32	19	100
Hispanio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Hungario/forinto	1750	4400	11000	7000	4200	22000
Irlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Islando/eŭro	10	25	61	37	22	122
Israelo/eŭro	7	18	46	28	17	92
Italio/eŭro	10	25	61	38	23	122
Japanio/eno	1120	2800	7000	4200	2520	14000
Kanado/dolaro	14	34	85	51	31	170
Latvio/lat	4	11	27	17	10	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	25	61	38	23	122
Norvegio/krono	80	200	500	300	180	1000
Nov-Zelando/dolaro	18	46	115	69	41	230
Pollando/zloto	25	60	150	95	55	300
Portugalo/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	5	12	31	19	11	62
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Slovenio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Svedio/krono	95	240	600	380	230	1200
Svislando/franko	14	34	85	51	31	170
Usono/dolaro	13	32	80	48	29	160
TARIFA A/eŭro	6	16	41	25	15	82
TARIFA B/eŭro	5	12	31	19	11	62

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFA A: Bahamoj, Honkongo, Korea Resp., Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFA B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Kategorioj

- MG** Membro kun Gvidlibro kaj monata reta novaĵbulteno.
- MJ(-T)** Membro kun Jarlibro kaj la revuo *Esperanto* rete (kaj ĝis inkl. 29 jaroj membro en TEJO kun *Kontakto* sen plia pago).
- MA(-T)** Membro-Abonanto kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*.
- DM(-T)** Dumviva Membro pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo MA. Oni ricevas la Jarlibron kaj *Esperanto*, kaj, dum oni estas ĝis inkl. 29-jara, membrecon en TEJO kun *Kontakto*.
- DMJ(-T)** Dumviva Membro kun Jarlibro pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo MJ. Oni ricevas la Jarlibron kaj, dum oni estas ĝis inkl. 29-jara, membrecon en TEJO kun *Kontakto*.
- DPat** Dumviva Patrono pagas por la tuta vivo en unu fojo 250-oblon de la kotizo MA. Oni ricevas la samajn eldonaĵojn kiel DM, kaj estas aŭtomate membro de Societo Zamenhof.
- PT** Patrono de TEJO pagas trioble la kotizon de MJ kaj ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.
- DPT** Dumviva Patrono de TEJO pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo de PT. Oni ricevas la samajn eldonaĵojn kiel PT.
- SZ** Kotizo por Societo Zamenhof, aparta societo por financaj apogantoj de UEA (ne inkluzivas membrecon en UEA). La minimuma kotizo estas duoblo de MA.
- SA** Abono al *Esperanto*, sen membreco en UEA.
- Kto** Abono al *Kontakto*, sen membreco en UEA/TEJO.

Somera Esperanto-Studado

Inter la 2-a kaj 10-a de julio 2010, E@I kune kun Slovaka Esperanta Junularo organizis en Slovakio Sameran Esperanto-Studadon 2010.

La populara internacia aranĝo SES okazis jam la kvaran fojon, kaj la trian fojon ĝi estis kunigita kun fizika renkontiĝo de *lernu!*-uzantoj. La aranĝo okazis en la Hotela Akademio de Ľudovít Winter en la banloko Piešťany.

Granda kaj de la organizantoj neantaŭvidita sukceso de la aranĝo estis en nombro de ĝiaj partoprenantoj. Sume aliĝis 219 personoj, venis 190 (plej multe el Pollando, Slovakio, Germanio, Hispanio kaj Francio). Kompare kun la pasinta jaro (kiam venis 90 personoj) temas pri granda kresko, kiun kaŭzis certgrade ankaŭ la malproksimeco de la ĉi-jaraj UK kaj IJK por eŭropanoj.

Tamen daŭre validas, ke preskaŭ duono de la partoprenantoj estas veraj komencantoj aŭ esperantistoj, kiuj ĝis tiam ankoraŭ ne partoprenis internacian E-aranĝon.

La programo konsistis el antaŭtagmeza lernado kaj posttagmezaj kulturaj, sportaj, lernigaj kaj distraj programeroj. La komencantojn instruis Stano Marček, la ceterajn grupojn Dalia Pileckienė kaj Petra Smidéliusz, spertulojn gvidis Marta Kovács (laŭvice sur la supra foto). Paralele okazis metodika seminario "Flugilo de Malfacila Vento", kiun gvidis Radojica Petrović (dekstre). Novaĵo estis instruado por nevidantaj personoj, kun instruistino Nedeljka Ložajić (apud Petrović), mem



nevidanta esperatistino el Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. Multaj eluzis la eblon trapasi KER-ekzamenon kaj diligente prepariĝis por ĝi dum la semajno sub gvidado de Zsófia Kóródy. Ŝi zorgis ankaŭ pri la parto de la programo por la projekto "Esperanto 55+", kiun financas la EU-programo "Grundtvig". Pere de ĝi povis veni al SES 25-membra pola grupo, kiu spertiĝadis pri instruado de Esperanto por povi ĝin sekve instrui en universitatoj de la tria aĝo. Pri novuloj tradicie zorgis "anĝeloj", spertaj esperantistoj, kiuj volonte helpis kaj konsilis.

Okazis kelkaj specialaj programeroj, kiel koktelista kurso, ornama tranĉado de fruktoj kaj legomoj, kurso de la japana batal-arto aikido, kiun partoprenis ankaŭ blinduloj, kaj nokta programo – nudpieda paŝado sur braĝo.

La aranĝo pasis kaj finiĝis sufiĉe sukcese, kion pruvas multaj pozitivaj reagoj de la partoprenintoj. La organiza teamo kore dankas al ĉiuj partoprenintoj, instruistoj, prelegintoj kaj aliaj subtenintoj de SES.

Ĝis revido dum la venonta SES!

Katarína Nosková



Parto de la partoprenantoj, kun diplomoj.
Foto: Peter Novotníček

La 83-a de SAT

De la 1-a ĝis la 6-a de aŭgusto 2010 en la pitoreska rumana urbo Brașov, en suda Transilvanio, okazis la 83-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda.



Foto: la aŭtoro

Ĝian "malkrokodilan etoson laboriste kamaradecan kaj klerige kulturan" ĝuis okdedo da kongresanoj el 16 landoj. La organizantoj, sub la gvidado de s-ino Radica Todor, en la lernejo "Andrei Saguno" kreis bonegajn kondiĉojn kaj taŭgan material-teknikan bazon por la laboro de la kongreso.

Kadre de la kongreso okazis jarkunsido de SAT. Plenumante la kongresan programon, la laborkunsidoj evoluis kun aktiva partopreno de la kongresanoj. La plej interesa kaj diskutata estis la ĉeftemo "Ekonomia krizo... kaj ties plurflankaj postefikoj".

La organizantoj preparis neforgeseblan kulturan, artan kaj turisman programon. La gastoj konatiĝis kun la belaĵoj kaj historio de Brașov, Rașnov kaj Sibiu, la urbo de Andreo Cseh, la regiono de suda Transilvanio, la riĉaj artaj kaj kulturaj heredaĵoj kaj tradicioj. Ne mankis ekskursoj al Bukareŝto kaj Sigișoara. Spektakloj kun tipaj rumanaj popolaj kutimoj kaj tradicioj, ekz. *La kalva kantistino* de Eugen Ionescu, ricevis merititan aplaŭdon. Bona, utila, sukcesa kaj fruktodona kongreso. La venonta SAT-Kongreso okazos en Sarajevo (30 jul – 06 aŭg 2011).

Milčo Beloreški

La 6-a Azia ĝuis Mongolion

De la 19-a ĝis la 23-a de junio 2010 okazis la 6-a Azia Kongreso de Esperanto en la hotelo Ĝingis-Ĥano, Ulanbatoro, la ĉefurbo de Mongolio.

Organizis ĝin Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) de UEA. En la kongresejo amasiĝis 215 kongresanoj el 27 landoj, ne nur azianoj, sed ankaŭ eŭropanoj, amerikanoj kaj oceanianoj.

La kongreso ekfunkciis tre glate en la ĝusta horo kun 32 buntaj fakaj kunsidoj, interkona vespero, nacia kaj internacia vesperoj, oratora konkurso kaj aŭkcio por viktimoj en Haitio. En la malferma ceremonio s-ro Lee Jungkee, prez. de KAEM, akcentis la rolon kaj kontribuon de azianoj por tutmondo de la Esperanto-movado. Sekvis gratulmesaĝo de la ĉefministro de Mongolio s-ro Sukhbaatar Batbold (prof. Samdan Tsendendamba, prez. de Mongola centro de Universala Homama Asocio legis ĝin). La LKK-prezidanto s-ro Chimedtseren Enkhee bonvenigis la kongresanojn en Mongolio.

Dum 5 tagoj okazis enhavriĉaj programoj kun aktiva engaĝiĝo de la kongresanoj: Esperantigo de naciaj trezoroj (Sasaki Teruhiro), Pri mongola historio, kulturo, lingvo kaj Esperanto-movado (LKK), Rememore al Lee Chong-yeong (Park Yongsung), Kaligrafio en la tuta Azio (Hori Yasuo), Oomoto (Ago Takaŝi), Ŭonbulismo (Kim Kwangsoo), Bahaismo (Paul Desailly), Komerco (Wang Tianyi), ILEI en Azio (Isikawa Tiekio, Mireille Grosjean), Skajpanoj (Liu Baoguo), Pri Seula Esperanto-Kulturcentro (Lee Jungkee), Aŭkcio (Tahira Masako), Universala Homama Asocio (Inagaki Yasuhiko), Kuracistoj (Harada Hideki, Park Whachong), Propedeŭtika valoro de Esperanto (Mireille Grosjean), Pri Tajvano (Cho Chaoming), Amikaro de Bruno (Edith Henrici), Unesko (Renée Triolle), Junuloj (Okuwaki Tosiomi), El la retaj projektoj japanaj por Esperanto



(Shibayama Zyun'iti), Tabloteniso (Tsuda Masao, Isogaj Naotake), Ĝemelaj urboj (Nakatsu Masanori), Transkontinenta trajno-vojaĝo (Tatjana Loskutova) kaj Rinĉen kaj Dogsuren (Chimedtseren Enkhee). Aparte menciindas, ke ravis la kongresanojn la Nacia Vespero pro sia altnivela arteco kaj la Internacia Vespero fare de kongresanoj pro kolorriĉaj naciaj kostumoj el nemalmultaj landoj. KAEM elektis novan gvidantaron, kiu servos dum tri jaroj. La novelektita prez. de KAEM prof. Sasaki Teruhiro el Japanio en la ferma ceremonio emfazis, ke ĉiu esperantisto devas agadi sur sia propra tereno. La 7-a Azia Kongreso de Esperanto okazos en Israelo en 2013.

Lee Jungkee

Denove aŭdeblaj dum la Ekonomia Forumo

8–10 sept. 2010 en la pola urbeto Krynica okazis la jubilea 20-a Ekonomia Forumo. Jam la 4-an fojon de Eŭropa Esperanto-Unio estis reprezentita ankaŭ Esperanto.

La aranĝo havas gravan signifon por la mez- kaj orient-eŭropa teritorio. La Ekonomia Forumo en Krynica estas altnivela aranĝo, kiun kutime partoprenas multaj decidpovaj personoj – politikistoj, ekonomikistoj, entreprenistoj kaj diplomatoj.



Petro Baláž, Dorota Rodzianko, Seán Ó Riain, Agnieszka Mozer kaj Guy Johnston.

Same estis ankaŭ ĉi-jare, tial eblis ekz. aŭskulti parolojn de la prezidanto de la Eŭropa Komisiono José Manuel Barroso, prezidanto de Eŭropa Parlamento Jerzy Buzek, la nova prezidento de Pollando Bronisław Komorowski kaj la prezidento de Estonio Toomas Hendrik Ilves.

EEU ĉi-jare denove elpaŝis kun propra podia diskuto kaj dum la aranĝo prizorgis informstandon pri Esperanto. La ĉeftemo de la podia diskuto estis: "Eŭropo sen konfliktoj – ĉu sufiĉos nur politikaj garantioj?" La gvidanto de la diskuto estis la prezidanto de EEU Seán Ó Riain. Aliaj prelegantoj estis Zbigniew Galor, Ilona Koutny kaj Barbara Despiney. La salono kun 45 homoj atente aŭskultis la diversajn vidpunktojn pri la temo.

La Esperanto-ĉeeston en la forumo kunfinancis samgrade tri organizoj: EEU, UEA kaj Esperantic Studies Foundation. Danke al tio eblis organizi sukcesan informadon: En la stando estis disdonitaj pli ol 1500 pecoj de diversaj informiloj en la pola, angla kaj rusa lingvoj. Preterpasantoj povis subiĝi al mallonga kvizo, malkovrante tiel la facilecon de Esperanto.

La estraro de EEU esperas daŭrigi ĉe tiu ĉi aranĝo kaj jam nun pripensas temon kaj prelegantojn por la venontjara forumo. Ni esperu pri daŭraj pozitivaj kaj sukcesaj videbligoj de Esperanto en similaj aranĝoj. Granda danko iru ĉefe al la prezidantino de PEA Halina Komar, kiu denove ebligis la partoprenon por EEU en la forumo, kaj al la helpantoj de PEJ.

Petro Baláž

Ŝaig Bähramoglu / Mamedov (1945-2010) mortis la 9-an de aŭgusto en Baku (Azerbajĝano). Li estis redaktoro de *Sovetia Esperantisto* 1989-90 kaj fondinto-prezidanto de Azerbajĝana E-Asocio.

André Bourdeaux forpasis la 29-an de julio en Chalon sur Saone (Francio). Li aktivis en la 60-aj kaj 70-aj jaroj, i.a. kiel estrarano de Unuiĝo Franca por E-o, zorgante pri informado. Gazetara ataŝeo por la francaj fervojoj, li uzis siajn profesiajn kontaktojn por E-o kaj sukcesis venigi al UK-oj ĵurnalistojn de gravaj gazetoj kiel *Le Monde* kaj *Le Figaro*.

Stojko Todorov Cankov (1929-2010) forpasis la 30-an de junio en Ruse (Bulgario), kie li estis delegito. Li peris E-revuojn kaj kunorganizis landajn kaj internaciajn E-renkontigojn.

Gerardo Flores Martín (1914-2010) forpasis la 9-an de aprilo en Madrido. Li estis membro n-ro 1 kaj prezidanto de Madrida E-Liceo kaj prezidanto de Hispana E-Federacio. Li estis unu el tiuj, kiuj efektivigis la aĉeton de oficejo por HEF en 1971, kaj li plej multe donacis al la fonduso por tiu celo. Advokato, li estis longe fakdelegito pri juro.

Huzisiro Kenzoo (1932-2010) mortis en Ōsaka la 9-an de majo. Sub la marko Eldonejo Pirato li eldonis dekon da gravaj verkoj, i.a. represon de *Historio de la mondlingvo* de Drezen (1967), *El la vivo de Syunkin* (1969; trad. Miyamoto), *Lingvo, stilo, formo* de Kalocsay (1970), *Aŭtuna foliaro* de Baghy (1971) kaj *Naskitaj sur la ruino* –

Okinavo de Miyamoto (1976).

Mariano D. Ibáñez (1925-2010) forpasis la 2-an de julio en Bariloche (Argentino). Li estis multjara membro de Societo Zamenhof kaj Patrono de TEJO.



Aleksandr V. Krasuckij (1956-2010) mortis la 27-an de julio en Kievo. Li tradukis multajn

kantojn, estis elektita kiel "Mister Esperanto" en 1984 en Jerevano kaj kunfondis la Societon "Espero" por subteno kaj defendo de la ukraina kulturo. Li aŭtoris la statuton de Ukraina E-Asocio, kies prezidanto li estis 2003-2006 kaj ĝenerala sekretario 2006-2009.

Göte Linghede (1916-2010) forpasis la 10-an de junio en Stokholmo. Li estis gvida aktivulo en blindulaj organizaĵoj kaj longe prezidis tiun de ŝakludantoj. E-on li lernis en la 30-aj jaroj. Li kolektis arĥivon de E-aĵoj, kiun li transdonis al la muzeo de svedaj vidhandikapuloj.

Magyari József (1923-2010), em. bankoficisto, mortis la 1-an de aŭgusto en Salgótarján (Hungario). Li estis delegito kaj fakdelegito pri bankaj aferoj, ekde 1954 instruis Esperanton kaj estis helpanto en du UK-oj.

Jan Pranger, la kultivinto de la tulipo "Esperanto", mortis preskaŭ 100-jara la 9-an de marto en Breezand (Nederlando).

Eurico Antônio Ribeiro (1935-2010) mortis la 18-an de julio en San-Paŭlo. Li kunredaktis dum kvar jaroj la

bultenon *Milde* de la Brazilia Sekcio de ILEI kaj kunfondis la eldonejon Amikoj de E-o, kiu eldonis lernilojn de Elvira Fontes.

Willy do Nascimento Sales (1930-2010) mortis en Resende (Brazilo), kie li estis multjara delegito kaj fakdelegito pri mekaniko.

Manoel Moacir Siscatti (1944-2010), em. instruisto, forpasis la 17-an de aŭgusto en Ribeirão Preto (Brazilo), kie li estis delegito ekde 1991 kaj antaŭe fakdelegito pri edukado. Li estis kunfondinto de Ribeirão Preto E-Klubo kaj aktive instruis la lingvon.



Umesao Tadao (1920-2010), eminenta japana kultura antropologo, forpasis la 3-an de

julio. Li studis zoologion en la Universitato de Kioto, sed poste dediĉis sin al kultura antropologio. En 1949 li iĝis profesoro, unue en Ōsaka, poste en Kioto. Lia ĉefverko *Ekologia rigardo al historio. La japana civilizacio en la monda kunteksto* (1967) estas unu el la plej influaj sciencaj libroj aperintaj en Japanio post la Dua Mondmilito. Por pli larĝa

publiko li verkis *La tekniko de intelekta produktado* (1969), kiu ĝis hodiaŭ furore vendiĝas. Umesao klarvide atentigis jam en 1963, ke tutmonde estiĝos "informad-socio".

Laŭ lia instigo, sur la tereno apud Ōsaka, kie en 1970 okazis Monda Ekspozicio, estis kreita Nacia Muzeo de Etnologio. Li estis ĝia unua ĝenerala direktoro de 1974 ĝis 1993. Kvankam en 1986 li preskaŭ perdis sian vidkapablon, li plu verkadis; en 1994 estis kompletigita lia 23-voluma Plena Verkaro. Li ricevis multajn ordenojn kaj aliajn honorigojn, al kiuj ekde 1980 apartenis membreco en la Honora Patrona Komitato de UEA. Umesao lernis E-on tuj post la milito. Tra sia tuta vivo li de tempo al tempo konigis sian esperantistecon al la japana publiko. Li kuntradukis japanen *Vivo de Zamenhof* de E. Privat (1965) kaj verkis la eseon *La spirito de Esperanto* (1983). En E-traduko aperis la libro *Sepdek-sep ŝlosiloj por la japana civilizacio* (1987), kies ĉefaŭtoro estis Umesao. En 1994 aperis lia japanlingva esearo *Esuperanto taiken* (Miaj travivaĵoj en Esperantujo). Dank' al kunlaboro inter li kaj UEA, la Nacia Muzeo de Etnologio ekde 1983 posedas valoran kolekton de libroj en kaj pri E-o (ĉ. 2700 volumoj), kiu estas daŭre riĉigata.

Anonceto

Unu vorto = 1 €. Ni ne respondacas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ Korespondna Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.

Senpagaj dokumentoj. Se vi deziras havi propran dokumentitan opinion pri la transdono de la gazeto redaktata dum 34 jaroj de Ada Fighiera-Sikorska kaj informiĝi pri la kondiĉoj ligitaj al tiu transdono, sendu al mi retmesaĝon. Vi ricevos senpage kopion de la originala transdona dokumento kaj de la postaj koncernaj mesaĝoj senditaj al la nova eldonanto. G. C. Fighiera: giancarlo.fighiera@libero.it



Malstreĉite post 5 minutoj / Entspannt in 5 Minuten. Anita Dröge, Brigitte Willand. En Esperanton trad. Karl Liebermann. En la anglan trad. Narvin Dalal. Stuttgart: La aŭtoroj, 2003. 47p. 16cm. ISBN 3000116141. Trilingva: germana, angla, Esperanto. Kolekto de ekzercoj por fizika kaj mensa malstreĉiĝo. €2,10. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Ĉiun tagon esti viva / Jeden Tag lebendig sein / Every Day Full of Life. Brigitte Willand, Anita Dröge, Hella Musall, Max Binder, Eva Binder. En Esperanton trad. Karl Liebermann. En la anglan trad. Narvin Dalal. Stuttgart: La aŭtoroj, 2008. 126p. 16cm. ISBN 9783000242885. Trilingva: germana, angla, Esperanto. Sugestoj por konservi la propran sanon. €5,70. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Manlibro pri instruado de Esperanto. Div. aŭtoroj. Red. Katalin Kováts. Hago: ILEI, 2009 (3-a eld.). 16p. 21cm. ISBN 9788089366057. Materialoj kolektitaj kadre de projekto por plivastigi kaj subteni instruadon de Esperanto inter junuloj. €8,70. Sesona rabato ekde tri ekzempleroj.

Metodiko de la Esperanto-instruado. Rudolf Rakuša. Rotterdam: UEA, 1991 (3-a eld.). 189p. 20cm. ISBN 929017045X. Baza pedagogia gvidilo por instruantoj de la internacia lingvo. €4,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Esperanto de nivelo al nivelo. Zs. Kóródy, M. Kovács, P. Salomonné Csíszár, L. Szabó. Red. kaj esperantigis M. Kovács. Budapest: ITK, 2008. 136p. 24cm. ISBN 9789632840406. Kolorilus. Helpmaterialo por prepariĝi por la ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro. €10,50. Sesona rabato ekde tri ekzempleroj.




Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA. Rotterdam: UEA/ILEI, 2008 (3-a eld.). 38p. 21cm. ISBN 9789290171041. Gvidilo alla elementa kaj meza niveloj kun celaro, postularo, regularo kaj specimenaj testoj. €4,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.



Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. John Wells. Rotterdam: UEA/CED, 1989 (2-a eld.). 76p. 23cm. ISBN 9290170212. Klasika, facile legebla prezento de la trajtoj de Esperanto el moderna scienca vidpunkto. La fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj semantiko estas klarigitaj per multaj ekzemploj el aliaj lingvoj. €5,70. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

Lingvo kaj menso. Noam Chomsky. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 2010. 188p. 21cm. ISBN 9789290171140. Kolekto de eseoj okupiĝantaj pri lingvosciencaj kontribuoj al studado de la menso, formo kaj signifo en naturaj lingvoj, naturo de la lingvo, lingvoscienco kaj filozofio, biolingvistiko. €9,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.





STAFETA POEZIO

Sub la eldona marko Stafeto aperis pluraj atentindaj poemaroj originale verkitaj en Esperanto. Jen speciala oferto de kelkaj el ili.




Ni devas vivi. Kjell Walraamoen, Lina Gabrielli. La Laguna: J. Régulo, 1974. 154p. 19cm. Du poetoj (unu suda kaj unu norda) en unu volumo. €1,80.

Vojo kaj vorto. Roberto Passos Nogueira. La Laguna: J. Régulo, 1972. 111p. 19cm. Originalaj poemoj kaj 18 modernaj tradukoj. €1,80.



Humoroj. William Auld. La Laguna: J. Régulo, 1969. 113p. 19cm. Pri la vakuo de la vivo kaj la homa kapablo rezisti, eĉ humore. €1,80.

Fajro sur mia lango. Edwin de Kock. La Laguna: J. Régulo, 1967. 119p. 19cm. Dua poemaro de grava originala poeto el Sud-Afriko. €1,80.



Sen paraŝuto. Poul Thorsen. La Laguna: J. Régulo, 1963. 143p. 19cm. Tri originalaj faskoj kaj 20 tradukoj (el la dana). €1,80.

Pinta krajono. Reto Rossetti. La Laguna: J. Régulo, 1959. 128p. 19cm. Seriozaj poemoj, spritaĵoj, parodioj, versa historio de la E-movado. €1,80.



Ĉe la Libroservo de UEA triona rabato por ajna kombino de minimume tri libroj, identaj aŭ ne, sendotaj samtempe al la sama adreso. Oferto valida ĝis la 30-a de novembro 2010. Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Tel. +31 10 436 1044. Fakso: +31 10 436 1751. Retpoŝto: libroservo@co.uea.org.